




Turka Stelo

La revueto de la turka esperantistaro
Aŭgusto 2018 n-ro: 32



Merhaba,

Aĝustos sayımızda gene birbirinden ilginç yazılarla sizinleyiz. Tüm yazılar birbirinden güzel ama şu dört yazı çok önemli:

- * La reveno de la patro (Adil Olluri)
- * Patrino (Julian Modest)
- * Kiel mi fariĝis esperantisto kaj kiel mi koniĝis kun D-ro Esperanto (Kabe)
- * Ĉio ŝanĝiĝu por ke nenio ŝanĝiĝu: UEA kaj la movado ĉe vojkruciĝo (Renato Corsetti)

Temmuz ayının en önemli olayı 28 Temmuz - 4 Aĝustos tarihleri arasından Lizbon, Portekizde gerçekleşen **103. Uluslararası Esperanto Kongresi**. Bu sene kongreye 75 ŭlkeden 1525 esperantist katıldı. Bu dergi elinize geĉtiĝinde bitmek üzere olan kongre hakkında daha fazla bilgiye ŝu baĝlantıdan ulaşabilirsiniz: <https://uea.org/kongresoj/> Önümüzdeki sayılarda bu kongre ile ilgili bazı kısa bilgilendirmeler yapacaĝız.

Hepinize iyi okumalar !

Saluton,


Ni denove estas kun vi pere de nia aŭgusta numero. Ĉiuj tekstoj estas tre belaj sed la jenaj kvar estas iomete pli elstaraj:

- * La reveno de la patro (Adil Olluri)
- * Patrino (Julian Modest)
- * Kiel mi fariĝis esperantisto kaj kiel mi koniĝis kun D-ro Esperanto (Kabe)
- * Ĉio ŝanĝiĝu por ke nenio ŝanĝiĝu: UEA kaj la movado ĉe vojkruciĝo (Renato Corsetti)

La plej grava okazaĵo de julio estas la **103-a Universala Kongreso de Esperanto**, kiu okazis inter la datoj 28-a de julio kaj 4-a de aŭgusto en Lisbono, Portugalio. Ĉijare partoprenas 1525 esperantistoj el 75 landoj tra la mondo. Kiam vi ricevos tiun revueton la kongreso estos preskaŭ en sia fino. Por pli da informoj vi povas uzi tiun ligilon: <https://uea.org/kongresoj/> En niaj venontaj numeroj ni faros kelkajn mallongajn sciigojn pri tiu kongreso.

Bonan legadon al ĉiuj !

SITE DE L'ASSOCIATION DES AMIS DU CDELI



TURKA STELO

Eldonanto : Turka esperantistaro

Redakcio : Vasil Kadifeli - vasilkadifeli (ĉe) gmail (punkto) com

Ĉeflingvo:	Kodo:
Esperanto (+turka)	Li-TUR-06

CDELI: Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia - Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds

Enhavtabelo

Malfermo	1
Enhavtabelo	2
Kursoj	2
Esperanto estas...	2
Esperanto Sumoo	3
UEA	3
TEJO	3
Leterojn ni ricevis el geamikoj	4
55-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET-55)	4
Mia ĝardeneto kiel infano	5
Blua Mar'	5
KASANDRA (ΚΑΣΣΑΝΔΡΑ)	6
La blej belaj okazaĵoj pri birdoj (parto 6)	8
La reveno de la patro	9
El la libro de "Dao de Jing" (24)	10
Hajkoj de Ivanička Maĝarova	11
Evelina Hanĝieva – La tero al ŝi parolas	11
La Aŭtunaj Muŝoj (parto 3)	12
Ŝercoj	13
Kurcvortenigmo	14
Lamanta Knabeto	14
Kiel mi fariĝis Esperantisto kaj kiel mi koniĝis kun D-ro Esperanto	15
Ĉio ŝanĝiĝu por ke nenio ŝanĝiĝu: UEA kaj la movado ĉe vojkruciĝo	16
Esperanto furoras en renkontiĝejo de Duolingo	17
Kiel baki ovon igas la universon pli ĥaosa	18
Raportoj el Japanio	21
Titoligo de urba placo al la esperantistoj Mario kaj Catina Dazzini	23
Mallonga Historio de Filozofio (31)	25
Jubileo de larĝmensa artisto	26
La larmoj de la blindulo	27
Gratulojn al "Esperanto en Azio" !	27
Patrino	28
Esperanto en Jalto plu vivas	29
Monda Premio de Opero en Esperanto en Ĉeha Nacia Teatro!	30
Andreo Cseh: legendo jam dum sia vivo	31
Facilaj rakontoj - Fabelo pri la racio	32
Solvo de la Krucvortenigmo	32

Kursoj



Pro la somera sezono nun estas neniu aktiva Esperanto kurso en Turkujo.

Esperanto estas....

Lingvo taŭga por ĉio
Lingvo kun multaj trajtoj
Lingvo uzata plurmaniere
Lingvo lernebla kaj lerninda por ĉiuj
Lingvo kun bunta movado
Lingvo de la estonteco



"Mi ĉiam deziris amikiĝi kun alilandanoj sed mi ne tiom bone regas fremdajn lingvojn. Mi decidis lerni Esperanton kaj nun mi havas amikojn en preskaŭ duono de la tergloblo!"

Mi Nomiĝas Ilia, Ĝakarta, Indonezio

Fonto: <https://www.facebook.com/tejoesperanto/posts/10156547443234732>

Ni atendas leterojn el niaj geamikoj



Nia revueto atendas leterojn el niaj geamikoj!

Ni invitas ĉiujn geamikojn, ambaŭ turkoj kaj fremduloj, skribi kaj sendi al ni siajn opiniojn pri nia revueto, pri Esperanto kaj pri aliaj aferoj kiel memoroj, reĉenzoj de libroj jam legitaj, vojaĝoj, kongresoj, ŝercoj ktp. Ni aperigos ilin en nia revueto. Bonvolu aldoni vian nomon, aĝon, urbon kaj landon. Nia kontakt-adreso estas: vasilkadifeli@gmail.com

La redaktanto ne respondecas pri la subskribitaj aŭ republikigitaj artikoloj.

Esperanto-Sumoo



Finiĝis la 53-a Esperanto Sumoo kiu okazis inter la 1-a ĝis la 8-a de julio 2018. La nombro de

partoprenantoj malmultiĝis al 286. La nombro de landoj estis 31.

La unuajn dek lokojn okupis la jenaj landoj: Japanio: 64, Koreio: 32, Francio: 32, Brazilo: 31, Pollando: 17, Rusio: 11, Vjetnamio: 11, Germanio: 11, Italio: 9, Nepalo: 7.

Turkujo kun nur 2 partoprenantoj okupis la 21-an lokon.

En tiu ĉi sumoo la proporcio de perfektaj venkintoj estis tre granda: 91,95% (263 el 286), eble pro la mallonga sumoo-periodo. Ĝis nun kutime la proporcioj estis ĉirkaŭ 80%.

Kvanto de legitaj paĝoj estis pli ol 7 000 paĝoj.

Komentoj:

1. En julio malmultiĝis partoprenantoj. La kaŭzoj estis feriado de svisaj gelernantoj kaj malmultiĝo de japanaj partoprenantoj.
2. Partoprenantoj el DR Kongo multiĝis eble danke al Sebhore, kiu instruas Esperanton en DR Kongo kaj Ugando.
3. Malaperis partoprenanto el Oceanio.
4. Koreoj partoprenis en la internacian grupon el sia propra korea grupo.
5. Por tiu ĉi sumoo laboris 15 kunlaborantoj, ni dankas al ili.

Jen la nova ret-adeso de nia retejo: <http://www.esperanto-sumoo.pl/>

UEA



N-ro 741 (2018-07-19)

Esperanto-tago 2018 — la 26-an de julio

Internaciaj

Organizaĵoj kreis tagojn por ĉiuj gravaj problemoj de la homaro, sed ankoraŭ ne por Esperanto. Bonŝance, esperantistoj jam de jaroj elpensis festi la Tagon de Esperanto la 26-an de julio ĉiujare. Temas pri la dato en kiu aperis la Unua Libro de Esperanto. [...]

N-ro 740 (2018-07-18)

UEA serĉas novan Estraranon

La 16-an de marto per reta voĉdono la Komitato de UEA decidis alelekti 2 kromajn estraranojn, tamen la voĉdono okazinta la 19-an de aprilo sukcesis elekti nur 1 kroman estraranon kaj dume la Estraro de UEA ree esprimis la bezonon alelekti estraranon kiu okupiĝu pri Kongresoj kaj Kulturo. [...]

N-ro 739 (2018-07-04)

Alvoko por filmi la 103-an UK

UEA serĉas esperantistojn, kiuj interesiĝas pri la filmado de la 103-a UK. La koncernaj homoj havu bonan filmilon kaj mikrofonon, lerton uzi ĝin, kapablon intervjui homojn kaj redakti filmojn. UEA provizos akreditadon de ĵurnalisto kaj aliron al ĉiuj eventoj al limigita nombro de filmistoj. [...]

N-ro 738 (2018-06-17)

UEA alvokas okaze de la Monda Tago de Rifuĝintoj

Unuiĝintaj Nacioj nomis la 20-an de junio Monda Tago de Rifuĝintoj. Ĉi-tage ni aparte memoras la multajn milionojn da homoj forigitaj el siaj hejmoj pro milito, perforto kaj naturaj katastrofoj. Universala Esperanto-Asocio solidariĝas [...]

TEJO



TEJO

partoprenis Altnivelan Politikan

Forumon HLPF 2018 ĉe United Nations

Rakoen Maertens reprezentis TEJO-n kaj UEA-n en HLPF 2018 – High-Level Political Forum (Altnivela Politika Forumo) ĉe United Nations en Novjorko. TEJO kunorganizis la flankan eventon pri Cirkla Ekonomio kaj Junularo. Rakoen rakontas: “Mia partopreno nome de TEJO estis belega okazo por refortigi la rilatojn kun la partneroj kiujn mi jam konas el nia agado [...]

Junulara konkurso pri publika parolado dum la Universala Kongreso en Lisbono

PRI LA ARTO PAROLI PUBLIKE: JUNULARA KONKURSO PRI PUBLIKA PAROLADO Por substreki la kernan rolon de publika parolado kaj ene kaj ekster nia movado, ĉi-jare gejunuloj ĝis 35 jaroj aliĝintaj al la kongreso estas invitataj partopreni la Junularan Konkurson pri Publika Parolado dum la 103-a Universala Kongreso en Lisbono. Cele al stabiligo de nova formato [...]

Konkurso: Landa Sekcio de la jaro 2017

Se vi fieras pri la agado kaj la atingoj de via Landa Sekcio dum la jaro 2017 kaj dezirus montri al la publiko viajn sukcesojn, kandidatiĝu por la konkurso Landa Sekcio de la jaro! Ĝi estas organizita de TEJO por kuraĝigi kaj videbligi la agadon de la plej aktiva landa sekcio de la jaro 2017. [...]





Leterojn ni ricevis el geamikoj



Saluton!

Unue mi devas admiri vian laboron plurfaceta rilate al Esperanto. Mi nun elŝutis la lastan numeron kaj foliumis ĝin. Ĝi verdire estas prestiĝa revuo. Mi gratulas al vi pro tio. Brave! Certe mi klopodas kontribui laŭ mia potenco kaj libertempo.

Mahmud Mirbozorgi, el Usono

Estimata, Denove mi ricevis vian bonegan "revuegon"! Kaj denove mi gratulas, ke ĝi plu alportas riĉenhavan, varian, valoran legaĵon. Aparte plaĉas al mi la varieco de temoj: filozofio, historio, mitologio, literaturo, poezio, movadaj diskutoj... Vere leginda, por ĉiaj gustoj! Dankegon!

Paulo Sergio Vianna, el Brazilio



Kara,

Vi nomas modestece vian eldonaĵon "revueto", sed laŭ mi ekde kelkaj numeroj ĝi estas "vera revuo", konsistanta el multaj rubrikaj, riĉenhavaj verkaĵoj kaj informaĵoj. Dankon ankaŭ pro aperigo de kontribuajfojo el Albanio.

Min atentigis poezio de Nazim Hikmet. Tiu tre amata verkisto ankaŭ por albanjoj, nelaste por infanoj plurestas en mia memoro. Nazim kritikis feŭdalisman postrestaĵojn en nova Turkio, burokratojn, arogantajn oficistojn, ĉion. Li eĉ suferis politikan enprizonigon. Ankoraŭ dankon,

Bardhyl Selimi, el Albanujo

Kara,

Mi dankas vin por la ĉiam enhavoriĉa kaj akurate sendita revuo. Dankon ankaŭ por la aperigo de la poemo de Klara Ilutoviĉ. Mi ĉiam printas kaj sendas al ŝi en papera letero ŝiajn poemojn aperigitajn, ĉar ŝi ne havas retaliron. Agrablan someron!

Lenke Szász, el Rumanio



Kara,

Gratulon pro la belega Turka Stelo! Kore,

Maria Nazaré Laroça, el Brazilio

Kara samideano,

Unue mi gratulas vin pro via admirinda agado favore al nia bela lingvo! TURKA STELO estas vere plaĉa, altvalora kaj leginda revuo! (... ne revueto!)

Mi kore dankas vin pro la aldono de mia traduko "La Aŭtunaj Muŝoj", kiun mi jam aperigis felietone en mia blogaro ĉe "IPERNITY" (kun aliaj tradukadoj).

Al ĉiuj esperantistoj mi deziras agrablan legadon!

Kun miaj plej amikaj salutoj el suda Francio,

Mikelo (Michel DEREYGER)



55-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET-55)

Litova Esperanto-Asocio afable invitas vin partopreni vicajn ĉiujarajn internaciajn somerajn tradiciajn la 55-ajn Baltiajn Esperanto-Tagojn (BET-55). La aranĝo estas dediĉata al la 100-jariĝo de Litova Esperanto-Asocio.

DATO: la 6-14-an de Julio, 2019. Veni al la aranĝo eblas jam la 5-an de Julio.

CELOJ kaj TASKOJ: studi problemojn de Esperanto-movado, elstarigi nuntempajn ĉefajn taskojn de Esperanto-agado, interŝanĝi sperton pri esperantista laboro, perfektigi en Esperanto, enhavoriĉe pasigi la tempon. Baltiaj Esperanto-Tagoj okazas ekde 1959 ĉiujare laŭvice en Latvio, Estonio, Litovio.

LOKO: BET-55 okazos en la nordlitovia urbo PANEVĖŽYS, kiu situas ambaŭflanke de la rivero NEVĖŽIS, 136 kilometrojn nordokcidenten for de la ĉefurbo de Litovio Vilnius.

Ĝi estas la kvina laŭ grandeco urbo de Litovio, grava industria kaj kultura centro. Panevėžys estas centro de la samtitola regiono kaj distrikto. La unuan fojon en historiaj fontoj ĝi estas menciita la 7-an de

Septembro, 1503. En 2018 en Panevėžys loĝas 98000 loĝantoj.

La ĉefa lokalo de BET-55 estos la moderne kaj bonege ekipita Fakultato en Panevėžys pri Teknologioj kaj Negocado de Kaŭna teknologia universitato (str. Nemuno 33), kie funkcios ĉiuj programeroj de BET-55. La loko estas libere kaj facile atingebla buse kaj aŭtomobile.

Partoprenantoj de BET-55 povos libere uzi ĉiujn ejojn kaj servojn de la fakultato (salonojn, aŭditoriojn, la plej modernajn teknikaĵojn, multajn komputilojn kun libera reta aliro k.s.). BET-55 havos subtenon, kunlaboron kaj diversflankan helpon de la urba municipo.

PARTOPRENO: ni invitas ĉiujn esperantistojn. Speciale ni dezirus vidi esperantistojn el la landoj ĉirkaŭ la Balta Maro, sed ankaŭ de ĉiuj aliaj najbaraj kaj pli foraj landoj. La kvanto de la partoprenantoj ne estas limigita.

POR PLI DA INFORMOJ:

<http://www.esperanto.lt/board/zboard.php?id=BET55&ckattemp=1>



Mia ĝardeneto kiel infano

ĜARDENUMI KIAM INFANO

Dum mia infaneco la kutimo en Nederlando estis, teni siajn junajn gefilojn hejme kaj prizorgi ilin mem. Sen ia instruado antaŭ la sesa jaro, la infanoj sukcesis en postaj lernejoj same bone kiel nun kun antaŭelementa instruado aŭ prizorgado. Sed mi mem havis pli longan senlernejan periodon, ĉar miaj gepatroj kredis la teoriojn de la franca filozofo Jean-Jacques Rousseau. Tiu verkisto asertis, ke por sana disvolviĝo de infanoj la lernejoj estas ege malbonaj. Do mia patro ricevis permeson de la registaro mem instrui min, sed la saman materion kiel en la oficialaj lernejoj. Kompreneble kelkfoje en la jaro mi buŝe ekzamenatis de inspektoro, kiu poste notis mian sukceson.

Tio pasis bone dum la unuaj du jaroj, kiam la lernendaĵoj ankoraŭ estis facilaj, escepte por la bela manskribado, kiun mi trovis tro malfacila. Ĉiukaze, mia patro ne kapablis disciplini min por la necesa laboro, kaj anstataŭ lerni legi kaj skribi kaj aritmetikumi mi laboris en mia malgranda ĝardeno kaj bone flegis la legomojn kaj la florojn. Miaj gepatroj ne interesiĝis pri ĝardenado, kvankam ili havis grandan ĝardenon. Ili ja aĉetis tipan farmdomon en vilaĝo apud Amsterdamo. Tiuj farmdomoj konsistis el malgranda brika domo por la farmista familio, al kiu estis kunligita granda konstruaĵo en kiu dum la vintro la farmisto tenadas siajn bovinojn, do por endome nutri kaj melki ilin. Pro tio ĉeestis akreo da tereno por meti la bovinojn dum la sezonŝanĝiĝoj lasante ilin tie por aranĝi la transporton, por la somera periodo, al granda ofte

memoraĵoj de Marcel Leereveld, el Aŭstralio

komuna buttereno kun sufiĉe da herbo por manĝi. Tiu nia loĝado daŭris nur kelkajn jarojn, ĉar mia patrino kaj la patro de mia patro tro multe kverelis. Sed dum miaj sesa kaj sepa kaj oka jaroj mi ĝuis mian laboron en mia ĝardeno.



Mia patro tamen ne nur ne havis la kapablon igi min fari kaj lerni la necesan lernejan laboron, sed krome ne havis multe da tempo ĉar li sekrete laboris en alia domo en Amsterdamo. Mi diras sekrete, ĉar li krome ricevis la senlaborulan pension. Kaj, kiel mi poste eltrovis, li tie ankaŭ havis sekretan amamikinon. Do kiam en la mezo de la tria jaro la inspektoro venis por ekzameni min, li trovis ke mi tre malmulte sciis pri la necesa lernoprogramo. Sen diri ion, li rigardis al mia patro kaj ambaŭ komencis rideti, kaj mia patro devis sendi min al la registara lernejo. Sed la inspektoro ne volis meti min en la duan klason, kies nivelon mi havis, sed metis min en la trian klason, promesante ke li ordonos mian instruistinon helpi min por akiri la necesan nivelon. Sed ŝi estis kolera ke mia patro trovis lernejojn malbonaj, kaj tial venĝe ŝi neniam helpis min. Mi tamen kapablis mem alĝustigi mian necesan laboron kaj en la fino de la elementa lernejo miaj rezultoj estis preskaŭ ĉie la plej bonaj en la klaso. Sed mi devis malzorgi mian ĝardeneton. Nur poste en Aŭstralio mi ree kreskigis legomojn kaj florojn.

Fonto: Aŭstralia Esperantisto AE #381

verkis **Marcel Leereveld**, el Aŭstralio

Blua mar'

poemo de Klara Ilutoviĉ, el Rusio



*** *Miaj impresoj pri Grekio, en kiu mi ne estis.* ***

Blua mar' kaj antikvaj ŝtonoj,
Papavej' kaj papiliar'
De l' natur' kaj de l' ter' imponoj
En brilo de l' malavar'.

Olivarboj salute verdas
Al ĝojplenaj okul' kaj kor'
Pri la amalfeliĉ' avertas
La kapel' de la ammemor'

Krius, jes, ankaŭ mi silente
Pro la plenpleniganta rav'
Kiu fluus imprestorente
Por la graca malĝojforlav'

En vivec' de l' vojaĝimagoj
Korpenetras la landmagi'
Grandan dankon al vi pro tagoj
Sub grekia ĉiel' kun vi!

verkis **Klara Ilutoviĉ**, el Rusio
kaj sendis al Lenke Szász

sendis **Lenke Szász**, el Rumanio
por Turka Stelo

magu ke vi estas ie kun viaj familianoj, amikoj, kunuloj, kun iuj ajn amataj personoj, kaj imagu ankaŭ, ke pro impulso neeksplikebla, instinkte sed tute certe, sen ajna dubo vi scias, ke post nelonge rabistoj atakos vin, aŭ ke okazos tertremo, aŭ inundo, aŭ incendio, aŭ alia malfeliĉaĵo.



Se tio okazus al vi, kion vi farus? Sendube per la tuta gorĝo vi krius, vi anoncus la teruran venontaĵon, vi klopodus fortiri viajn amatajn personojn malproksimen de la danĝero; ĉu ne? Kaj se viaj kunuloj ne nur ignorus vian panikon, sed ridegus, eĉ mokus kaj ridindigus vin pro via ŝajne freneza konduto, kiel vi sentus? Mi scias, sendube vi estus nepriskribeble malfeliĉa.

Tamen, estas io, ankoraŭ pli ekstrema: imagu, ke, fakte, post nelonge, rabista atako, aŭ tertremo, aŭ incendio okazis, ke kelkaj el viaj kunuloj mortis, ke aliaj suferis damaĝon. En tia okazo, kompreneble, vi atendus, ke la savitaj viaj proksimuloj, ŝokite petos de vi pardonon, ili miros ĉar vi povis antaŭvidi la neatenditan malbonon, ili agos kontraŭ vi pli amikeme, ili sendube promesos, ke ekde nun ili respektos viajn parolojn; ĉu ne?

Jen, nun, la plej kriza demando: se, malgraŭ tio kio okazis, tiuj viaj kunuloj daŭrigus vin ignori, ne donus ian ajn atenton al vi, dirus nenion pri la afero, pri via averto, eĉ se kelkaj daŭrigus la mokadon, kiel vi sentus? Mi scias, plene, tuttute malfeliĉa!

Mi klopodis, eble naivstile, tamen mi klopodis kiel eble plej klarbilde priskribi la nekredoblan staton, la akran malfeliĉon kiun spertis multfoje en sia ne longa vivo, unu el miaj antikvaj amatinoj, Kasandra!

Kasandra estis reĝidino; ŝi estis unu el la kvar filinoj de Priamo (Πρίαμος), la potenca reĝo de Trojo (Τροία). Oni diradis, ke ŝi estis tre bela, multaj estis certaj, ke ŝi estis la plej bela virino de Trojo ĝis kiam tuŝis la grundon de la malbonsorta lando la piedo de Helena (Ελένη), la fatala belulino, kaŭzo de la multjara Troja Milito (Τρωικός Πόλεμος). Ĉu tiom, ĉu ne tiom bela, Kasandra, ekde sia frua juneco, estis, laŭ sia

karaktero kaj konduto, iom ekstervaganca, ne tute ordinara knabino. Ŝi estis bonkora, ĝentila, kompatema, sindonema, korhumila, sed ofte ŝi montris ke ŝi vivas en sia propra, nevidebla mondo, malproksime de la aliuloj.



Apolono (Απόλλων), la nobla dio de la suno kaj la lumo, iam, en formo homa, renkontis Kasandran en la kamparo kaj ŝia beleco, ŝia tuta eksteraĵo, sinteno, manieroj impresis kaj ĉarmis lin multe. Li alcele renkontis ŝin denove kaj post nelonge li enamiĝis al ŝi. Kiel protektanto de la poezio kaj artoj, Apolono estis milda kaj galanta, li ne estis kruda kiel lia patro Zeŭso (Ζεὺς) kaj aliaj dioj. Kiam li deziris akiri virinon, li ne uzis sian dian povon, forton aŭ artifikojn, li klopodis gajni la favoron kaj reciprokecon de la junulino. Do, en tiu okazo, li prezentis sin tia kia vere estas kaj konfesis al Kasandra sian amon kaj sian deziron kuniĝi kun ŝi. Kasandra, kiu neniam estis montrinta intereson pri viroj, strange, ne nur ne timis aŭ impresiĝis, sed senhezite ŝi jesis, metinte tamen kondiĉon al la dio; ŝi petis ke li donu al ŝi la forton, tute senerare antaŭvidi la estontaĵojn. La dio, per nur unu sia blovo, transdonis al ŝi la divenarton, li igis ŝin kapabla, senerare antaŭvidi ĉion ajn. Kompreneble, Kasandra estis kontenta kaj ĝoja, tamen kiam la dio provis ŝin brakumi, ŝi rezistis, ŝi ne plu volis plenumi sian promeson. La nobla dio konfuziĝis; por la unua fojo li iĝis viktimo de virina kaprico, li, do, ekkoleris, li forgesis sian ampasion, kaj ĉar li ne povis repreni sian donacon, li ĵetis sur ŝin dian malbenon. Jes, Kasandra povos ĉion senerare antaŭvidi, sed neniu homo kredos al ŝi! La puno estis severa, tamen, ni ĉiuj scias, ke krimo kontraŭ la amo ne estas pardonebla!

Ekde tiam, Kasandra komencis sperti la daŭran indiferentecon, malestimon, izolitecon. Ŝi antaŭvidis ion, ofte tre gravan, krizan, sed ĉiuj flankenpuŝis ŝin, neniu atentis aŭ kredis al ŝi. Tamen, ĉar ŝi ne ĉesadis klopodi, ĉar ŝi persiste ĝenadis siajn proksimulojn per siaj, ŝajne sensencaj, avertoj, iom-post-iome disvastiĝis la famo, ke la reĝidino estas freneza.

Pariso (Πάρις), la filo de Priamo kaj frato de Kasandra, pro kialoj, kiuj estas temo de alia rakontado, estis perdita kiam li estis novnaskita bebo. Post jaroj, kiam subite, sin prezentis en la palaco, Kasandra, kiu tuj komprenis kiu li estas, kaptis hakilon kaj provis lin mortigi. -Ŝi faris tion, ĉar ŝi estis la sola, kiu sciis ke Pariso estos la kaŭzinto de la totala milito kaj la detruo de Trojo.

Jarojn pli poste, kiam Pariso anoncis al sia patro



vojaĝo estos la komenco de la pereigo de la patrujo.

En la daŭro de la multjara sieĝado kaj la kruela milito, ĉiumatene, kiam la trojaj militistoj ekkiris al la batalkampo, Kasandra, kiu sciis kiuj el ili ne revenos, vane klopodadis konvinki ilin eviti la batalon; ĉiufoje ŝi gajnis indiferentecon, eĉ mokadon.

Iam, ŝajnis, ke la sorto ridetis al Kasandra. Tio okazis, kiam Otrioneo (Οθρυονεύς), juna Trako (Θραξ), aliancano de Priamo, kiu per sia armeo partoprenis la grandan militon ĉe la flanko de la Trojanoj, enamiĝis al Kasandra, malatentante la famon pri frenezo de la reĝidino. Tiun fojon, Kasandra reciprokis la amon de la brava junulo, kiu petis ŝian manon de Priamo. Ĉio estis interkonsentita kaj reĝdece aranĝita, tamen, la antaŭtagon de la geedziga ceremonio, en kruela batalo, Otrioneo, heroe falis, kaj Kasandra estis kondamnita al dumviva malfeliĉo.

En la fina kunsido de la troja reĝo kaj la militistoj, en kiu estis decidite, ke oni enirigu la Lignan Ĉevalon (Δούρειος Ίππος) en la urbon, Kasandra, minacante, forpuŝante, batante la gardistojn, sukcesis eniri en la reĝan kunvensalonon, kie, kun krioj kaj plorego petegadis la suverenojn ne fari tion. Ŝi klopodadis konvinki la konsilion, ke tiu ĉevalo estas unu ankoraŭ dola entrepreno de la malamikoj, ke en ĝi estas kaŝitaj batalantoj, pretaj konkeri kaj detrui la landon. Vane! ankoraŭfoje vane! Nur perforte oni sukcesis tiri ŝin ekster la salonon, kaj post tio, Kasandra bone sciis ke ĉio estas definitive perdita.

Venis la nokto kaj la ĉevalo estis tirita en la urbon, kaj ĉiuj en la palaco dormis serene; nur Kasandra maldormis atendante la alvenon de la obskura destino. Ŝi estis la unua, kiu aŭdis la pezajn paŝojn, la armilbruon, la krudajn ordonojn de la sovaĝaj invadintoj; ŝi estis la unua kiu aŭdis la dolorkriojn, la veojn, la plorĝemadon, ŝi estis la sola kiu vidis la unuajn flamojn, kiu aŭdis la bruegon de la falanta peza pordego de la palaco. Ŝi sciis bone kio sekvus, sed ŝi ne povis vidi de proksime la mortigon de sia patro, de siaj fratoj, familianoj, amikoj. Ŝi kuris ĉe la

sian decidon vojaĝi tra la mondo por ĝin koni, Kasandra petegadis Priamon, ne permesitio; ŝi vane sciigis al sia patro, ke tiu

altaro de Atena (Αθηνά), ŝi brakumis firme la idolon de la diino kaj plorante petegis pri la dia protekto.

La unua kiu renversis la pordon kaj furioze impetis en la preĝĉambro estis Ajakso (Αίας) el Lokrido (Λοκρίς), unu el la distingindaj kaj tre fortaj militistoj de la Aĥajanoj (Αχαιοί). Lia aspekto estis sovaĝa, terura, lia vizaĝo, lia armilaro estis dense sangomakulitaj, liaj okuloj estis strange brilaj, lia elspiro malakuta. Li ekvidis Kasandran kaj tuj ekkaptis, forte tiris kaj faligis ŝin surteren. Kasandra ne lasis la sanktan idolon, kiu falis kun ŝi, tamen Ajakso ne donis atenton al tio, li violente disŝiris ŝiajn vestojn kaj ŝin seksperfortis kruele!

La sakrilegio de Ajakso kontraŭ la diino tiris nepriskribeblan punon, tamen tio ne interesan nin ĉi tie.

La virinoj ne estis mortigitaj, ili estis parto de la militakiraĵoj de la venkintoj. La virinoj de la palaco, membroj de la reĝa familio estis disdonitaj ne al oficiroj kaj soldatoj, sed al la militistoj. Agamemnono (Αγαμέμνων), la majesta reĝo de Miceno (Μυκήναι), ĝenerala ĉefo de la tuta helena militistaro, elektis la unua. Kompreneble li ne lasis la belegan Kasandran, kiu iĝis posedaĵo de la granda reĝo, ties sklavino kaj konkubino. Malgraŭ sia sklaveco, post kelka tempo Kasandra komencis alkutimiĝi al sia nova stato. Helpis tio, ke Agamemnono kondukis al ŝi ĝentile, kompleze, kiel decas al nobelino. Tiele, la tempo pasis trankvile, kaj kiam ĉio finiĝis, kiam ĉiuj postmilitaj taskoj de la reĝo estis plenumitaj, lia ŝiparo ekiris revenante al Miceno.

Tamen, tie, dum la longa foresto de Agamemnono, la reĝino Klitemnestra (Κλυταιμνήστρα) estis sekse allogita de Egisto (Αίγισθος), la kuzo de la reĝo. La geamorantoj iom-post-iome forpelis aŭ ekstermis la familianojn kaj fidelulojn de la reĝo kaj iĝis mastroj de la lando. Longe ili esperis ke li ne revenos al la patrujo kaj kiam ili ricevis la informon ke la reĝa ŝiparo alproksimiĝas, ili organizis sian teruran krimon. Egisto estis la unua kiu bonakceptis la reĝon en la haveno. Li invitis lin en sia apuda domo, por iom ripozi, kaj Agamemnono kun sia sekvantaro kaj Kasandra sensuspekte sekvis lin. Tie estis antaŭaranĝita la embusko kaj kiam la invititoj eniris, kaŝitaj,



peze armitaj viroj, sin ĵetis sur ilin kaj ĉiujn murdis. Agamemnonon mortigis Egisto kaj Kasandran trapikis per glavo Klitemnestra mem. La malfeliĉa junulino, falinte etendis sian manon al la proksime agonianta reĝo, petante, ankoraŭfoje vane, helpon.

Ŝia korpo, nuda, estis ĵetita en foran torenton kaj tiele estis finita la tristokaŭza historio de Kasandra!

Ŝi trompis dion kaj ŝi trompis lin pri amafero! Ŝi malrespektis kaj ofendis dion, precipe ŝi montris profundan malestimon al la eroto, kaj tio lasta ŝajnas,

ne nur al la dioj, sed al multaj homoj, ankaŭ al mi, peko tre peza.

Tamen, mi amas Kasandran, do, mi devas diri, ke la puno estis misproporcia al la krimo. Kaj mi pensas, ke la reago de la afabla Apolono estis pli barbara ol tiuj de aliaj, klare severaj kaj senindulgaj dioj; ŝajnas al mi, ke kruda, definitiva puno estas pli justa ol nedefinitiva daŭra venĝo!

verkis **Spiros Sarafian**, el Grekujo

La blej belaj okazaĵoj pri birdoj (parto 6)

Elian-J. Finbert, naskiĝinta en 1896 en Egipto, poste iris en Francujon kaj iĝis beletristo, verkis ĉiajn librojn, romanojn, memoroj pri spertoj de lia travivaĵriĉa vivo, kiel kamelisto en Saharo, paŝtisto en provencaj Alpoj, proverbaroj el multaj popoloj, ĉefe iĝis konata dum jaroj 1950-aj pro lia serio de libroj, radioelsendoj kaj revuartikoloj : « La plej belaj rakontoj pri bestoj ».

La unuan el tiuj libroj mi esperantigis, ĝi aperis ĉe la eldonoj de MAS : jen ĝi en la katalogo de UEA : <http://katalogo.uea.org/?inf=9437>

Unu alia el tiuj libroj estis «Plej belaj okazaĵoj pri birdoj», eldonita en 1957. Mi esperantigis kelkajn rakontojn el tiu libro. Jen ili, kelkaj estas malgajaj, eĉ kruelaj. Kelkaj montras, ke birdoj foje ja scias, kio estas malespero pro morto, kaj scipovas sin kondukti trafe dum ĉagreno, kia leciono por homoj...

TURTO (rakonto n° 238 p. 333)



Elvokante memoron de mia turto, tuta mia infanaĝo ekaperas denove. Ĝi estis la unua besta estaĵo, al kiu mi direktis korsenton.

Ĝin estis donacinta al mi kolego, por sin senbalastigi, ĉar li konvinkiĝis, ke ĝi estas mortonta. Efektive, apenaŭ plumkovrita, ĝi aspektis tre malbonfarti, sed mi tiom zorge flegis ĝin, ke ĝi resaniĝis, kaj korligiĝis tiome al mi ke, mi ja ne povadis eskapi el la

sendis R. Platteau, el Francio

fidelmontroj, per kiuj ĝi min superŝutis.

Ĝi sekvis min ĉien. Konstante en libero, ĝi flugadis ĉambr-al-ĉambre kaj, se de l'fenestro okazis ke ĝi ekvidis min en strato, ĝi alvenis sin meti sur mian ŝultron. Kaj ekestis riverencoj, kaj amikaj kveroj, kaj bekfrapetoj senfinaj; ĝi ŝveladis la gorĝon, vigleta kaj plenfeliĉa.

Jaroj tiel pasis, kaj ĝia inklino daŭre pliiĝis dum la tempopaso; Ĉiu el miaj neĉeestoj estis al ĝi la kaŭzo de senlima aflikto. Ekde mi foriris, ĝi ekkomprenis tre certe, ke mi estis malproksime, tro malproksime por regajni min. Ĝi tial kuntiris sin en malhelan angulon de l'apartamento kaj la kapon malleviĝinta, la flugilojn skuitaj per hakita tremetado, ĝi eligis la tutan tagon tiun kveradon malrapidan kaj melankolian tiom rimarkindan ĉe la turtoj. Kaj estis ege malfacila igi ĝin konsenti pri manĝado kelkiom da nutro.

Sed ĉe mia reveno estis superfluanta ĝojo, senfina, komparebla nur al tiu, kiun hundoj, ĉefe la hispanhundoj, elmontras je sia mastro kiam lin revidante post longa foresto.

Neniam tiom, kiom en tiu turto mi renkontis tioman emocian intenson en la korligo kaj fido.

(FINO)

tradukis **Roland Platteau**, el Francio

Rakonto de Adil Olluri, el Albanujo

Kiom malpeza vi fariĝis, patro! Neniam mi pensis ke iamfoje mi portus vin per nur unu mia brako kaj mia mano. Sur ĉi tiu sako korvokolora pendas blanka papero, kie oni estas notinta kelkajn numerojn al vi apartenantaj, la solajn kozojn kiuj nun distingas vin disde la aliaj, kiuj bonŝancis reveni tiel facile en la patrio, kiu ilin nun apenaŭ interesas plu.

Parolu, do, patro! Diru min almenaŭ unu vorton! Eligu voĉon kaj rakontu min kial interesis vin la patrio, pro kiu vi fariĝis tiom malpeza kaj senkarna?! Ĉu ne sufiĉis do ni?! Ne sufiĉis la patrino, kiu zorgis pri vi, kvazaŭ monaĥino staranta antaŭ sankta templo, kiu obeis vin kvazaŭ plej dediĉema kredantino al la profeto kaj humiliĝis, kvazaŭ la plej humilkapulina sklavino al la spirita gvidanto?! Ĉu ne sufiĉis mi, kiu sekvis vian modelon en ĉion, kion mi faris, en ĉiu vorto kion mi parolis?! Ĉu ne sufiĉis la urbo malferminta la pordojn por vi, kies stratoj kisis la paŝojn en ĉiu benita mateno kaj ĉiu mornbrova krepusko dum la vesperoj?! Ĉu ne estis ni por vi la patrio aŭ ĝi troviĝis ie sur la supraj nevideblaj etaĝoj de la ĉielo, kiujn mi apenaŭ povis kaj ne povas plu vidi?!

Dum mi portas vin surŝultre, mi pensas pri la tempoj kiam mi estis ne pli ol du jara kaj vi portis min surbrake kaj promenigis min tra la urbaj parkoj aŭ tra la verdaj kampoj de via naskiĝvilaĝo aŭ ĉirkaŭ la hejma korto de la avo. Vi viŝis miajn lipojn kaj vangojn kiomfoje mi malpuriĝis pro la dolĉaĵoj kiujn vi aĉetis por mi kontinue, ankaŭ tiam kiam mi ne volis.



Sekvis vi min kiomfoje mi sukcesis eskapi de via mano. Ho, kiom plaĉis min kiam mi vidis vin postkurante min. Mi gajiĝis, ridegis, kiam vi ne sukcesis atingi min, eĉ kiam vi estis tiel proksime al mi kiel sufiĉis nur etendi la manon por kapti min. Mi

gajece ĝuadis miajn venkojn, kiujn fiere mi sciigis al la patrino kaj al la avo, kiuj amis min tiel kiel vi. Mi rememoras ke tiuj post jaro, min ne plu plaĉis tiuj postsekvoj, ĉar mi eksentis ke vi povus kapti min imediate, sed vi intence ne atingis min, nur por igi min ekridegi.



Plaĉis al mi kiam vi portis min surbrake ien ajn ni iradis, krom la vojon kondukanta al la kuracisto, aparte al tiu grandokululo, kies aspekto fariĝis por mi kvazaŭ noktomonstro. Mi malamis ne nur lin, sed ĉiun kuraciston. Mi neniel povus toleri tiun medikamentan aromon kiu estis en tiuj lokoj, Ne povis mi toleri tiujn senanimajn punkciilojn, kiuj tiel malvarmsange boris mian korpon. Fariĝis por mi koŝmaro tiuj diablaj punkciiloj, kiuj pikis min ĉiutage.

La patrino rakontis min ke dufoje vi imagis min mortinta en tiu malvasta kaŝangulo de la kliniko, kio por mi transformiĝis en korpobuĉa kaŝangulo, kiun mi ne volis vidi alokule, sed vi kontinue venigis tien, ĉar vi malŝatis ke min okupu eĉ malsanulero.

Plaĉis min tiuj momentetoj, kiam mi fariĝis kvar jara kaj vi venigis min al la kafejo kun viaj amikoj. Vi instigis min eldiri mian nomon kaj ili demandis kies patro mi estis, kaj mi fiere menciis vian nomon. Mi rediris la vortojn dentopordente kiam ili diris ke vi ne estis tia kia mi pensis pri vi. Kiom multe ili ekridis kiam mi aldiris ke tiaj estis ja ili mem, ke ilia nazo estis malrekta, ilia abdomeno estis pli granda ol la ava korbego en la vilaĝo, ke iliaj filoj ankoraŭ elpisis surlite, dum mi iris mem al la necesejo. Kiom da beleco havis kaj kiom da feliĉeco vekis ĉe mi tiujn tagojn kun vi, kiuj apenaŭ povas facile forgesiĝi.

Ĉio rompiĝis iutage kiam, reveninte pli frue ol kutime hejme, vi diris al la patrino ke vi ne plu irus al la laborejo, ne pro malŝato, sed ĉar oni ne plu permesis lin tie. Vi diris ŝin ke vi ekirus, sekvontan semajnon, en foran landon, kie neniu dirus vin ne plu labori. Mi ne vidis vin ekirante, ĉar vi estis survojiĝinta malfruajn noktajn horojn kaj vi ne volis rompi mian dormon. La patrino ne memoris, ĉu vi estas kisinta min surfrunte aŭ ne, ĉar via aŭtista amiko ne povis atendi longe, sed ŝi ja rememoris ke vi estis enirinta en la ĉambro kaj estis kovrinta min per la oranĝkolora kaj dika lankovrilo kaj estis petinta ŝin, ke ŝi gardu min kvankam estis nokto de frua septembro.

Ni ricevadis ofte viajn leterojn kun via kaligrafio, kiun mi klopodis kopii longajn semajnojn. Mi estis obscenita skribi ĉiun literon kiel vi. Venadis la ilustritaj bildkartoj, ardkoloraj, kiujn mi konservis apud la dikkovrilaj kajeroj, senditaj de vi kiuj diferencis disde

tiuj aĉetataj en nia urbo. Mi orgojladis per ili antaŭ miaj samklasanoj de la dua grado. Venadis ankaŭ via voĉo tra la onkla telefono, kun duonviŝitaj numeroj, kiun li tenis ĉe la koridora muro de sia loĝejo, duoble pli granda ol la nia. Venadis ĉio de vi, sed vi mem neniam venis, patro.

Pasis jam ok jaroj senfrapante vi al la pordo de nia loĝejo. Mi fariĝis dekkvarjarulo, kaj vi ne vidis min kreskante. Oni diris nin ke vi estis reveninta en nia lando kaj restis en profunda montara vilaĝo, ĉar vi ne kuraĝis eniri en la urbon. Oni diris ke vi estis decidinta alporti nin la liberon kaj senigi nin je timo pro la uniformuloj kiuj ne parolis nian lingvon. Volis vi venĝi kontraŭ ilin, kiuj ne parolis kiel ni, venĝi kontraŭ tiujn kiuj ne lasis vin labori, kiuj persekvadis vin kaj forigis vin disde ni. La patrino ne povis kredi, ke vi, tiel kvieti kaj mildkoreca, povus kapti armilon kaj aldirekti ĝin al iu alia, dum mi ĉiutage turmentis min, kompilante planojn en mia menso kiel veni en tiu fora vilaĝo por vin vidi kune kun ĉiuj liberoportantoj.

La milito finiĝis. Mi kaj la patrino estis foririntaj por pli facile saviĝi. La libero alvenis, sed vi apenaŭ videbliĝis ie. Ni atendis vin ĉirkaŭ du monatojn post la milito por ke vi ekaperu en nia loĝejo kaj ni ekĝoju pro ĉi tiuj venkaj tagoj, sed vi ne donis iun vivsignon, ne donis iun ateston, ĝis kiam ni eksciis ke vi estis militkaptita kaj oni ne sciis en kiu prizono kaj loko oni estis forsendinta vin.

Ĉiun nokton mi vidis vin en la sonĝo, pendigita kapture sur la plafono de la malluma ĉambro, katenita manpiede per malligebla ŝnuro, tenita de malnova trabo, samkiel tri malbelajn, sovaĝmienajn

policistojn, frapantaj vin senkompate. Kiomfoje vi anhelis dolore pro iliaj fortaj frapoj, ĉi tiuj enfalis en ekstazon pro plezuro, laŭtvoĉe ridante ĝis la ĉiela firmamento. Ili ĝojis pro venko, ĉar estis sklavinta iun, kuraĝinta redoni ilin la kuglon. Por igi pli kontentiga sian amuziĝon, ili tute senvestigis vin kaj alfrapis pli arogante, per sia tuta forto. Via korpo estis sangumita kaj viaj lipoj demandis nur akvon, sed la senkompatuloj neniel zorgis pri tio, ili pensis ke vian soifon povus estingi nur la sangoguto, kiu elfluis de via frunto kaj de viaj ŝiritaj brovoj. Elgutis via korpo en tiu malluma ĉambro, kovrante la ties nigran koloron per la makuloj de la ruĝo. Tiuj noktoj por mi estis plenplenaj per koŝmaroj, kaj, se ne estis la patrino, ankaŭ mi irus al la monto.

Mi kaj la patrino serĉadis vin longajn jarojn. Ni ne lasis homon sen demandi, ne lasis spurojn ne sekvante. Ni volis scii en kiu loko oni estis pereiginta vin. Kvankam pasis jardeko da libero, por kiu vi oferiĝis, ni ankoraŭ esperis ke iutage vi revenus viva, ke iutage, tute neatendite, vi puŝus la tintilan butonon de nia loĝejo, aŭ senbrue enirus en ĝin, dum malfruaj horoj, samkiel vi faris por eliri de tie, por ke ne revenu iam ajn. Ni esperis kaj nur esperis, ĝiskiam iutage ni ricevis novaĵon ke via korpo estis jam trovita, kies ostoj mi portas nun subaksele, envolvitaj en ĉi tiu nigra sako.

tradukis **Bardhyl Selimi**, el Albanujo

El la libro de "Dao De Jing" verkita de ĉina filozofo Laocio, fondinto de Taoismo (24)

DUA PARTO - LA VIVO

46



**Se TAŬO regas surtere,
la kurĉevaloj estas uzataj por sterki kampojn.
Se TAŬO malĉeestas surtere,
oni bredas militĉevalojn sur komuna herbejo.
Ne estas pli granda peko ol multaj deziroj.
Ne estas pli granda fiaĵo ol malkontenteco.
Ne estas pli granda eraro ol avidi havi.**

Tial la kontento pri la kontento estas daŭra kontento.

Rimarko de Cezar

Ankaŭ en tiu ĉi ĉapitro Laocio prezentis kvazaŭ tute modernajn postulojn: ke oni amu la pacon, ke oni

misfidu al tro da posedo kaj modestu pri la uzado de niaj naturaj resursoj.

Vilhelmo:

„Se TAŬO malĉeestas surtere,
oni bredas militĉevalojn sur komuna herbejo.“

Rimarko de Anniespera

La originala teksto de tiu ĉi frazo lauvorte eble tradukeblus tiel:

Militĉevalo naskiĝas sur kampo apud batalejo.

Ne estas pli granda peko ol multaj deziroj.

Ne estas pli granda fiaĵo ol malkontenteco.

Ne estas pli granda eraro ol avidi havi.

Vd. en la traduko de Wang Chongfang:

„Nenia malfeliĉo estas pli granda ol la malkontenteco;

Nenia kulpo estas pli granda ol la nesatigebla avido.“

(daŭrigota)

HAJKOJ

verkis kaj sendis Ivaniĉka Maĝarova, el Bulgario

La manoj petas
bluson. Piano tristas.
Botel' da 'Ŝherry'
* * *

Tablo, du tasoj,
krucigitaj rigardoj.
La kafo amaras.
* * *

Arĝentspegulo
vian vizaĝon strekas.
Kandel' finbrulas.
* * *

Mia fenestro
nokte vian rigardas.
L'amo doloras.
* * *

Flugil de birdo
en sorĉita sunsubir'.
Falinta nesto.
* * *

Purpursubiro
stelan polvon disĵetas,
lunon banigas.

Sur la pentraĵo
strekojn naskas animo.
Amo el farboj.
* * *

Ho...! Papilio
tuŝetis mian brakon.
Tener' eriĝema.
* * *

Manplatoj tremas
La ŝtono ekparolis.
Ĝemo en silent'.
* * *

Trapikas aŭror'
l'arbaron en blua maten'.
Spiro de suno.
* * *

Frostiĝinta paser'
sur la fenestro frapas.
Ĵetita paner'.
* * *

En la ĝardeno
la safranoj ekflavas.
Ekpaŝas printemp'.

Acidĉerizflor'.
Zumeto de l'abeloj.
Dolĉa estas l'frukt'.
* * *

La palaj fingroj
jen sorĉadas la klavojn.
Ŝekspira sonet'.

verkis kaj sendis
Ivaniĉka Maĝarova
el Razgrad Bulgario



Evelina Hanĝieva * – La tero al ŝi parolas

verkis Elena Popova, el Bulgario



Ŝi per peniko,
argilo kaj papero
mondon kreadas.
* * *

Papilio de
sun' lumigita, ĉiam
flugiloj flirtas.
* * *

Floroj odoras
el pentraĵoj. Al anim'
ĉarmon ŝi donas.

Pentras ŝi kaktan –
doloras de la dornoj.
Kvankam helpemaj.
* * *

Stranga ĝardeno
el argil' parolas. Ho,
la floroj kantas! ...
* * *

L' malnova fotel'
kaŝas vivan memoron.
Fluas varmeco.

La papilio –
belega kiel floro.
Metamorfozo.
* * *

Floroj en bildo
neniam tristas. Freŝec'
en blua vazo.
* * *

Bambua invit'
al papilioj. Ho ve,
mallonga vivo!
* * *

Printempo floras
kun koloroj el la ark'.
Kantanta junec'.

* Evelina Hanĝieva estas
pentristino kaj direktoro de
artgalerio en urbo Dobriĉ, Bulgario

verkis kaj sendis
Elena Popova,
el Bulgario



Karaj geomikoj, karaj legantoj,
Kun plezuro, mi prezentas al vi mian novan
tradukaĵon. Temas pri novelo, eĉ mallonga
romano, de Irène NEMIROVSKY (1903-1942).



Image Irène naskiĝis en Ukraino (tiam Rusia Imperio) en juda familio, kiu parolis la francan. Kiam komencis la Rusia Revolucio, ŝi migris kun sia familio al Francio, kie ŝi iĝis fama verkistino. Arestita de francaj ĝendarmoj kaj deportita, ŝi estis mortigita de la nazioj en Aŭŝvico (Auschwitz).

Forgesita post la Dua Mondmilito, ŝi estas la sola verkisto, kiu ricevis la Premion Renaudot postmorte pro ŝia longa romano "Suite française" (2004).

Ŝian novelon "La Balo" mi jam tradukis en Esperanto.

(Ligiloj :

<https://www.ipernity.com/blog/mike59/685797>

kaj ankaŭ ĉi tie:

<https://novajhoj.weebly.com/libroj-en-esperanto.html>

aŭ ĉe Facebook:

<https://www.facebook.com/groups/librejo/files>)

Mi deziras al vi agrablan legadon!

Koran dankon al IVAR kaj GINETTE pro la atenta legado kaj iliaj amikaj rimarkoj !
Dankon al TJERI pro liaj klarigoj.

MIKELO (Michel Dereyger)


LA AŬTUNAJ MUŜOJ (1931) (daŭrigata)

Helena Vasiljevna momente fermis la okulojn, revidis siajn du pli aĝajn filojn, iliajn vizaĝojn, iliajn ludojn... Cirilo, ŝia plej ŝatata, estis tiel bela, tiel... feliĉa... Pri li ŝi tremis pli ol pri Jurij. Ŝi pasie amis ilin ĉiujn... sed Cirilo... Ha ! Estis ja peko sonĝi pri tio !...

"Dio mia ! Protektu ilin; savu ilin. Bonvolu, ke ni maljuniĝos ĉirkaŭitaj de ĉiuj niaj infanoj... Aŭskultu min, Sinjoro ! Ĉio kuŝas en la manoj de Dio !" diris Tatjana Ivanovna.

Skuanta la neĝerojn alkroĉitajn al la maŝoj de sia ŝalo,

Tatjana Ivanovna supreniris la ŝtupojn de la teraso.
Ili revenis en la salonon.



La piano jam silentis.
Starante meze de l' ĉambro la junuloj interparolis duonvoĉe.

"Estas nun tempo, infanoj miaj", diris Helena Vasiljevna.

Cirilo mangestis.

"Bone, Panjo, ni tuj iros... Ni ankoraŭ trinku unu glason, sinjoroj !"

Ili trinkis je la sano de l'imperiestro, de l'imperiestra familio, de la aliancanoj, kaj je la detruo de Germanio. Post ĉiu tosto ili teren ĵetis la ĉampanglasojn kaj la lakeoj silente kolektis ties pecojn.

La aliaj servistoj atendis en la galerio.

Kiam la oficioj pasis preter ili, ĉiuj samtempe rediris kvazaŭ mornan lecionon parkere lernitan :
"Nu... adiaŭ Cirilo Nikolajeviĉ... Adiaŭ Jurij Nikolajeviĉ."

Unu nura, la maljuna kuiristo Antipe, ĉiam ebria kaj trista, klinis sian dikan grizan kapon sur la ŝultron kaj nekonscie aldonis per forta kaj raŭka voĉo :
"Dio gardu vin sanaj !"

"La tempoj ŝanĝiĝis", grumblis Tatjana Ivanovna. "La iama foriro de la barin-oj**... La tempoj ŝanĝiĝis, kaj la homoj..."

Ŝi sekvis Jurij-n kaj Cirilon sur la terason.
Rapide falis la neĝo.

La lakeoj levis siajn lumigitajn lanternojn, prilumigante ĉe la sojlo de l'aleo du statuojn de Belona* flagrantajn pro glacio kaj prujno, kaj la malnovan parkon senmovan.

Lastan fojon Tatjana Ivanovna krucoŝignis super la glitveturilo kaj la vojo.

La junuloj vokis ŝin kaj ridante prezentis al ŝi siajn brulantajn vangojn frapitajn de l' nokta vento.

"Nu, adiaŭ, fartu bone, oldulino mia ! Ne timu, ni revenos!"

La koĉero ekprenis la kondukrimenojn, eligis ian krion, iun strangan kaj akran fajfadon, kaj la ĉevaloj ekiris. Unu el la lakeoj teren metis la lanternon kaj oscedis.
"Ĉu vi restas tie, avino ?"

La maljunulino ne respondis. Ili foriris.
Ŝi vidis la lumojn de la teraso kaj tiujn de la vestiblo estingiĝi unu post la alia.

En la domo, Nikolao Aleksandroviĉ nekonscie ekprenis botelon da ĉampano el la manoj de l' lakeo.
"Kial vi ne trinkas ?" li pene murmuris. "Necesas trinki."

Li zorge plenigis la prezentitajn glasojn; liaj fingroj iom tremetis.

Dika viro kun tinkturitaj lipharoj, generalo Sjedov, alproksimiĝis kaj flustris en lian orelon :
"Ne turmentiĝu, kara. Mi parolis al Lia Moŝto. Li prizorgos ilin, estu trankvila !"

Nikolao Aleksandroviĉ malrapide levis la ŝultrojn. Ankaŭ li jam iris al Sankt-Peterburgo... li ricevis leterojn kaj aŭdienciojn. Li parolis kun la Grandduko. Kvazaŭ li povus malhelpi la kuglojn kaj disenterion...

"Kiam la infanoj finkreskis, oni povas nur kruci la brakojn kaj lasi la vivon evolui... Sed oni ankoraŭ klopodas, oni kuras, nu, oni imagas al si... Mi maljuniĝas", li subite sonĝas, "maljuniĝas kaj malkuraĝiĝas... La milito ?... Dio mia, ĉu pli belan sorton mi revis dudekjaraĝe ? "

Laŭtvoĉe li diris :

"Dankon Mikaelo Mikajloviĉ... Kion diri ? Ili faros kiel

la aliuloj. Dio nur donu al ni venkon !"

La maljuna generalo fervore rediris :

"Tion Dio volu !"

Silentis la aliuloj, la junuloj kiuj jam restis ĉe la fronto. Unu el ili maŝine malfermis la pianon kaj ekludis kelkajn notojn.

"Dancu, infanoj miaj !" diris Nikolao Aleksandroviĉ.

Li ree sidiĝis ĉe la briĝotablo kaj mansignis al sia edzino.

"Vi devus iri ripozi, Nelly ! Rigardu kiel pala vi estas !"
"Ankaŭ vi !" ŝi duonvoĉe diris.

Ili silente manpremis kaj Helena Vasilijevna eliris. La maljuna Karin prenis la kartojn kaj ekludis. De tempo al tempo, li nerve palpis la diskon de l' kandelingo, kun distrita mieno.

Fino de l' unua ĉapitro

* Belona: milita diino en Roma mitologio.

[https://eo.wikipedia.org/wiki/Belona_\(diino\)](https://eo.wikipedia.org/wiki/Belona_(diino))

** Barin : en la malnova Rusio : titolo donita de subulo al superulo (mastro).

(daŭrigota)

tradukis MIKELO (Michel Deryger), el Francio

Ŝercoj

— Kiomjara vi estas?
— 30 jara...
— Sed jam antaŭ 10 jaroj vi diris same...
— Kompreneble! Mi ne estas tia persono kiu hodiaŭ diras ion, kaj morgaŭ alion...

* * *

Antaŭ kelkaj jaroj mi demandis ĉarman junulinon, kiu estis ŝia amata okupo. Kiam ŝi finis rakonti al mi, ni jam havis du ĉarmajn infanojn!

* * *

Kiam mi konatiĝas kun iu kaj tiu diras al mi "estas agrable konatiĝi kun vi", mi ĉiam respondas : "Ne rapidiĝu al konkludo!"

* * *

Edzo revenas hejmen malfrue nokte kaj lia edzino riproĉas lin:

- Ĝis kiam vi daŭros renkonti aliajn virinojn? Ni jam



havas tri gefilojn, kaj unu eĉ ne estas de vi!

* * *

Du amikinoj interparolas. La unua rakontas pri io okazis al ŝi antaŭ du tagoj:

— Mi bele vestis kaj parfumis min. Tiam mi iris al drinkejo-dancejo. Tie mi konatiĝis kun bela junulo. Ni drinkis iomete, ni dancis, poste ni drinkis plue, ni dancis, ni kisis unu la alian, ni denove drinkis. Mi jam iomete malstreĉiĝiŝu, kial li trovis la momenton kaj li...

— Ho! Ĉu la kanajlo seksperfortis vin?

— Ne, li forlasis min!



1	2			3	4		5
6			7				
		8				9	
10					11		

SILABA KRUCVORTENIGMO

Skribu silabon en ĉiu kvadrato. Jen estas listo de bezonaj silaboj:

A, DA, DI, DI, E, ES, GI-O, ĜO, I, KRE, LO, MAT, NER, NO, O, PA, PE, PEN, PO, PO, RAN, SU, TI, TO, TO, TO.

HORIZONTALAJ DIFINOJ (→)

1. Komenciĝo, starto; 3. Dato de kreaĵo; 6. Klopodo, strebo; 7. ___ komplekso (Freud); 8. En fiziko, estas la rezisto de korpo al ŝanĝo de sia movkondiĉo; 9. ___ tutmonde, agu loke; 10. Branĉo de matematiko

kiu studas la nociojn de kontinueco kaj konekseco; 11. Animala graso.

VERTIKALAJ DIFINOJ (↓)

1. La plej disvastigita internacia planlingvo; 2. Kontenero en la vitkultivado por kolekto de la vinberoj; 3. Agnosko, bonhavo; 4. Kolektiva; 5. Ruĝa supo; 7. La E de E=mc²; 8. Internacia Labor-Oficejo; 9. Esti alligita per unu ekstremo.

Fonto: Semajno de Enigmoj #1

<http://www.semajnodeenigmoj.com>

(La solvoj troviĝas en la lasta paĝo)

Lamanta Knabeto

-- el revuo Vesperto

am vivis knabeto, kies piedo estis malsana. Li lamis kaj li povis iri nur tre malrapide. Pro tio la infanoj primokis lin. Neniu volis ludi kun la knabeto. Tial li ĉiam estis sola. Kiam la infanoj ludis sur la korto de la lernejo, li nur rigardis ilin malgaje.

Ofte li revadis, ke lia malsana piedo resaniĝos kaj ankaŭ li povos kuri, eĉ kuregi, kiel la aliaj knaboj.

Sed ĝi estis nur sonĝo kaj ĝi neniam realiĝis.

En iu tago nova knabino alvenis al la lernejo. Ŝi estis blonda kaj longhara.

Onidire ŝi estis eminenta lernantino. Ĉefe ŝi ŝatis la matematikon.

Unue la infanoj strange rigardis ŝin. Ŝi estis fremda en la klaso. Vere la instruistino prezentis ŝin al la gelemantoj, sed komence neniu volis paroli kun la nova knabino.

En la lernohora paŭzo, la infanoj kuris al la korto. Ŝi kaj la knabeto restis en la lernoĉambro.

La knabino interesiĝante rigardis al li kaj fine ŝi demandis:

— Ĉu vi ne iros al la korto?

La knabeto ruĝiĝis kaj ne sciis, kion respondi. Li timis diri, ke li havas malsanan piedon kaj li iras malrapide.

— Mia piedo doloras min — li elbuŝigis fine kaj li klinis sian kapon. Li ne kuraĝis rigardi al la knabino.

— Kio okazis al via piedo? Ĉu vi falis aŭ stumblis?

— Ne — li respondis krute.

— Eble ĝi rompiĝis. Ĉu ne?

— Ne — sekvis longa paŭzo kaj fine li diris. — Mia piedo estas denaske malsana.

— Ĉu vi estas lamanto?

— Jes.

La knabeto ege timis, se tion ĉi li elbuŝigos, la blonda knabino forlasos lin, kiel la aliaj gelemantoj. Li fermis siajn okulojn kaj kvazaŭ li jam estus aŭdanta ŝiajn malproksimiĝantajn paŝojn forrapidante el la lernoĉambro.

Kiam li malfermis la okulojn la knabino ankoraŭ estis apud li kaj ŝi ne deziris forlasi lin, eĉ ŝajnis pli amikema.

— Ne malgaju! Se vi volas, mi fariĝos via amikino. Mi ludos kun vi.

Tiu ĉi tre surprizis la knabon. Ĝis nun neniu volis fariĝi lia amiko.

— Ĉu vi sincere fariĝos mia amiko? — li demandis mire. — Ja, vi scias, mi ne povas iri rapide. Mi lamas. La infanoj priridos ankaŭ vin pro mi.

La blonda knabino ekridetis kaj prenis la manon de la knabo.

— Ni iru al la korto! — ŝi diris amikece.

La knabo preskaŭ ekploris pro la ĝojo. Li ne volis

En la jaro 1887, kiam aperis la unua broŝuro de Dr. Esperanto, mi estis liceano en Varsovio. Unu el miaj kolegoj, S. D., granda ŝerculo, aĉetis la lernolibreton, legis ĝin al ni dum la paŭzoj inter la lecionoj kaj uzis sian tutan spritecon por moki la lingvon kaj precipe kelkajn sufiksojn, kiujn li trovis ... maldecaj. Mi devas konfesi, ke ankaŭ mi partoprenis kaj subtenis la mokojn kaj ĉar mi estis bona latinisto, mi forte kritikis la lingvon, en kiu mankas, interalie, tiaj formoj kiel "futurum exactum" kaj "plusquamperfectum". Tamen la versaĵoj ĉarmis min kaj dum kelke da tagoj senĉese "en sonĝo principon mi vidis." Post kelke da semajnoj mia kolego S. D. forgesis pri la maldeca sufikso, mi pri la principo. La leganto ne juĝu nin tro severe : ni estis junaj, la vetero estis bela, ne estas do mirinde, ke la boatveturado sur Vistulo allogis nin pli forte, ol nova lingvo; ĉu ne sufiĉe jam tedis nin la antikvaj !

Pasis 16 jaroj. Kiel abonanto de la angla "Review of Reviews" mi legis tie kun intereso la esperantan kronikon, sed post kelke da monatoj ĝi komencis inciti min. "Kia diablo estas tiu Esperanto, kiun faris en Varsovio iu D-ro Zamenhof, okulisto, same kiel mi ?" Mi aĉetis la unuan malgrandan broŝuron de Dr. Esperanto por Poloj, mi prenis de kolego (li tiam ne estis ankoraŭ Esperantisto) la jarkolekton 1896 de "Lingvo Internacia" kaj post kelke da tagoj, ĝustadire post kelkhora laboro, mi jam libere komprenis ĉiajn esperantajn tekstojn sen helpo de vortaro.


Mi jam konis la novan lingvon, mi ekdeziris koniĝi kun ĝia aŭtoro; kaj vere mi ne konis lin; mi pensis, ke oni bezonas pretekston por lin viziti en lia hejmo. Baldaŭ mi trovis rimedon : mi iris al la Doktoro, por aĉeti kelke da unuaj esperantaj eldonaĵoj, kiujn li tiam ankoraŭ vendadis en sia loĝejo. D-ro Zamenhof akceptas la malsanulojn de la 4-a ĝis la 6-a horo, mi do venis tuj post la 6-a. La atendejo estis ankoraŭ plena kaj mi devis esti pacienca preskaŭ unu horon. Fine eliris el la kabineto la lasta paciento, kaj kun batanta koro mi min prezentis al la Majstro. D-ro Zamenhof estis jam iom laca, sed eksciinte pri la celo de mia vizito, li tre afable akceptis min, kaj ni komencis esperante interparolon pri Esperanto. Mi konstatis kun plezuro, ke sen iu ajn peno mi komprenas ĉion; ĉu D-ro Zamenhof same facile komprenis min, mi ne scias, sed mi iom dubas, ĉar de mia konvertiĝo pasis apenaŭ unu semajno. La simpleco kaj natureco de la manieroj de l' Doktoro tute ĉarmis min; kun streĉita atento mi aŭskultis ĉiun

lian vorton kaj mi decidis, ke mi pli ofte ... aĉetos esperantajn broŝurojn kaj librojn. Je la 8-a horo D-ro Zamenhof komencis oscedi.

Timante, ke mi tedis lin, mi tuj lin adiaŭis kaj foriris. Mi ankoraŭ ne sciis tiam, ke nia Majstro ĉiam kaj ĉie oscedas vespere; mi tion eksciis nur poste kaj mi trankviliĝis. "Bone" pensis mi, "ne mi estis la kulpo." Sed tute konsolita mi min eksentis nur dum la Dresdena kongreso : D-ro Zamenhof, tute ne indiferenta je "das ewig Weibliche", oscedis vespere, parolante kun fraŭlino Hedwig Reicher !

Mi daŭrigis miajn vizitojn, sed mi devas konfesi, ke ne ĉiuj kontentigis min. Traleginte unu propagandan broŝuron, la ekzercaron kaj kelke da noveloj kaj tradukinte du rakontetojn, mi venis al firma konkludo, ke diversaj reformoj estas absolute neeviteblaj en Esperanto kaj mi prezentis miajn proponojn al la Doktoro. Kun miro mi konstatis, ke li ne estas ravita kaj ke li ne volas akcepti ilin. "Terura konservativulo," pensis mi, "mi ne plu diskutos kun li pri la reformoj; baldaŭ li komprenos sian eraron kaj bedaŭros, ke li ne adoptis pli frue miajn proponojn."

Mia esperanta biblioteko pli kaj pli grandiĝis, mi pli kaj pli intime ekkonis dum miaj vizitoj nian Mastron, ne nur kiel aŭtoron de Esperanto, sed ankaŭ kiel homon, kiel idealiston, kiel noblan viron, kiu ĉiam pensas pri aliaj kaj ĉiam forgesas pri si mem. Hodiaŭ en la 50-a datreveno de lia naskotago kun ĉiuj Esperantistoj mi sendas al li miajn sincerajn dezirojn de longa kaj feliĉa vivo kaj kunigas mian voĉon kun tiu de ĉiuj samideanoj en fiera aklamo: "Ecce homo!"



Fonto : revuo **UNIVERSO**, numero 4, paĝoj 113-114-115, publikigita en 1909

El blogo "Pioniroj de Esperanto"

<https://pionirojdeesperanto.wordpress.com/2018/06/13/biografio-pri-kazimierz-bein/>

verkis **Kazimierz Bein (KABE)**, el Pollando (15-12-1909)

Multaj ŝatantoj de statistikoj produktis longajn seriojn de numeraloj por klarigi, ke la membronombro de UEA falas kaj ke la nombro de paĝoj en Vikipedio kreskas. Ili certe faras utilan laboron, sed kiu ajn movadano konstatas sen statistikoj, ke UEA kaj la tradicia movado postlumas la evoluon de la mondo. Tion oni simple vidas en la Esperanto-klubo de iu ajn granda urbo de Eŭropo (ekzemple, Londono aŭ Moskvo).

Tradicie, ĝis la sepdekaj jaroj de la pasinta jarcento oni normale estis varbita por kurso en sia urbeto, aŭ hazarde vidis kaj aĉetis lernolibron en sia librovendejo, lernis la lingvon, aliĝis al loka klubo, pere de ĝi kontaktis la landan asocion, kaj pere de la landa asocio kontaktis la internacian movadon. Tiu tuta procedo postulis kelkajn jarojn, dum kiuj firmiĝis la lojalecoj al la diversnivela tavolo de la movado. Tiam, se oni volis resti parto de la movado, nepre oni bezonis la kluban bultenon, la landan revuon aŭ la revuon de UEA.

En la nuna mondo oni lernas ĉefe rete. Fenomenoj kiel Duolingo aŭ lernu.net pravas tion. Iusence ili estas la moderna versio de la amasaj kursoj de Andreo Cseh. De la reta lernado oni transiras al la filmetoj en Jutubo kaj poste al skajpo kaj Fejsbuko kaj kompreneble oni faras tion tute senpage. La loka klubo, la landa asocio kaj UEA venas poste, se entute ili venas.

Se entute ili venas, ĉar la novaj lernintoj ne sentas iun ajn lojalecon al la strukturoj de la tradicia movado, kaj ili ankaŭ ne bezonas tiujn strukturojn. Por pruvi tion, mi interrompis la verkadon por pruvi, ke per la reto oni trovas ĉion. Mi entajpis “esperantistoj Ulan Bator” en serĉ-programo, kaj tuj mi trovis kelkajn informojn pri mongolaj esperantistoj, sen bezono pri la jarlibro. Se mi dediĉus iom pli da tempo, certe mi povus trovi eĉ la koloron de la okuloj de la sekretario de la loka ulanbatora klubo pere de la fako “bildoj” de Guglo.

Do, ne estas mirinde, ke UEA (kaj ĉiuj aliaj esperantistaj asocioj, grupoj, kluboj) havas konsiderindan penon trovi homojn, kiuj estas pretaj pagi aliĝkotizon por servoj, kiujn ili ne plu bezonas.

Restas unu servo, kiu malgraŭ ĉiuj ŝanĝiĝoj ankoraŭ altiras homojn, kaj tio estas la homaj kunvenoj kaj de la lokaj grupoj kaj de landaj asocioj kaj de UEA, la Universalaj Kongresoj. Malgraŭ ĉiuj teĥnikaj komunikiloj homoj ankoraŭ ŝatas rigardi aliajn homojn en la okuloj kaj rekte interparoli en Esperanto. Eĉ usonaj lernantoj de Duolingo iniciatas serĉi

loĝantojn en la propra regiono por renkontiĝi. Bonŝance homoj ankoraŭ restas homaj.

Tamen, ĉu la tradiciaj strukturoj estas ankoraŭ utilaj? Pri ĉi tiu punkto la opinioj malsamas. Mi mem opinias, ke ili estas ankoraŭ necesaj. Monda asocio, kiu reprezentu nin ĉe Unesko, ankoraŭ estas bezonata. Landaj asocioj, kiuj postulu leĝojn pri instruado de Esperanto en la landaj lernejoj kaj informu en sia lingvo, ankoraŭ estas bezonataj. Lokaj kluboj, kiuj kontaktu urbajn estrarojn kaj informu pri Esperanto en sia medio, ankoraŭ necesas.

Aliflanke por ke ili restu en la centro de la movado kaj kun la tradicia gvida rolo, alivorte por ke nenio ŝanĝiĝu en la strukturo de la movado, ili devas komplete renoviĝi, ĉio devas ŝanĝiĝi.

Imponaj fizikaj sidejoj kaj oficejoj en multekostaj landoj fariĝas malpli kaj malpli bezonataj. Jam de jardekoj firmaoj migris al pli kosto-favoraj landoj kaj transportis tien siajn servojn. Se oni telefonas informpete al la propra banko en Britujo, plej ofte respondas barata telefonisto, kiu sidas ie en Barato. Oficistoj cedas sian lokon pli kaj pli al aŭtomatigitaj procedoj. Se oni ne kredas pri tio, oni demandu sindikatistojn, kial ili protestas pro perdo de laborlokoj en Francujo aŭ en similaj landoj.

Paperaj revuoj estas io de la pasinteco. Oni bezonas ilin por la generacio, kiu estas malaperanta, sed ne por la novaj generacioj. Mi konas kelkajn junajn intelektulojn, kiuj neniam aĉetis ĵurnalon dum sia tuta vivo, kaj mi mem estas postĉasata de gazeto kiel *Le monde diplomatique* aŭ *The Economist*, kiuj daŭre proponas al mi kelkajn siajn artikolojn senpage en la reto en la espero, ke mi iam pretos pagi por la papera versio.

“Librojn legu la verkisto”, – diris fama poemo de Baghy. Fakte ankaŭ la publiko legu ilin sed prefere en elektronika legilo. Mi volas diri, ke la tradiciaj libroservoj estas ĉie en krizo, kiel enkrizas kaj fermiĝas la librobutikoj de niaj urboj. Ni ne povas pretervivi la normalan mondon.

Do, se neniuj servo, krom la renkontiĝoj, altiras homojn, kion organuzu la tradiciaj strukturoj? Al kio ili dediĉu sin? Unue ili dediĉu sin al sia moderniĝo laŭ la supraj rimarkoj. Ne temas pri io facila. Mi ne enbias la estraranojn de UEA kaj de la landaj asocioj, kiuj devas fari la decidojn kontraŭ maljunaj membroj, kiuj protestas, ĉar oni tro rapide transformiĝas, kaj kontraŭ junaj membroj, kiuj protestas, ĉar oni tro malrapide



transformiĝas.

Poste ili dediĉu sin al la vera kaj sola kialo, por kiu la Esperanto-organizaĵoj ekzistas, al la daŭrigo de la tasko de Zamenhof, al la disvastigo de la ideo de internacia lingvo kiel ilo de frateco inter la popoloj kaj de paco.

Eble mi estas iom ekstrema, sed la Esperanto-movado rajtas ekzisti nur pro tiu unu sola ideo de Zamenhof, kaj danke al ĝi ni travivis ekstreme sangan jarcenton kaj rezistis persekutojn kaj militojn. La mondo bezonas, ke ni parolu pri ĝi ĉefe al tiuj, kiuj ne volas aŭskulti ĝin. Se ni ne faras tion, ni estas sensignifaj por la mondo.

Tamen por esti liberaj fari tion, ni devas transformi nin de asocioj por vartado de la nunaj parolantoj de Esperanto en tradicia maniero al asocioj de agadoj por Esperanto, de asocioj de membroj al asocioj de partoprenantoj en kaj financantoj de agadoj por plibonigi la mondon.

verkis **Renato Corsetti**, el Italujo

Fonto: La Balta Ondo

<http://sezonoj.ru/2018/05/corsetti>

Esperanto furoras en renkontiĝejo de Duolingo

-- el Libera Folio

Esp^{er}anto jam iĝis la 6-a plej aktiva lingvo en la nova sistemo de Duolingo por fizikaj renkontiĝoj de lernantoj. UEA helpas funkciigi la sistemon en Esperanto, kiu aldoniĝos al la jamaj du lingvoj, la angla kaj la hispana.



Jam pli ol 1,7 milionoj da homoj eklernis Esperanton per la retejo Duolingo, sed malmultaj el ili ekhavas

kontakton kun veraj parolantoj de la lingvo. Nun UEA kunlaboros kun Duolingo por faciligi renkontiĝojn.


La kursoj de Duolingo okazas nur en la reto, sed antaŭ iom da tempo Duolingo lanĉis la sistemon de Duolingo-eventoj, kiu ebligas organizadon de komunaj renkontiĝoj por ekzerciĝi pri la lernata lingvo, ekzemple en kafejoj aŭ aliaj lokoj. Por organizi "eventon" oni devas esti oficiala gastiganto, aprobita de Duolingo.

Por la aprobo necesas plenigi formularon kaj poste esti intervjuita de la administrantoj de Duolingo. Ĝis nun la formularoj ekzistas nur en la angla kaj la hispana, kaj same la intervjuoj povas okazi nur en tiuj du lingvoj. Tamen Esperanto rapide iĝis la sesa plej aktiva lingvo en la sistemo de Duolingo-eventoj.

Estis kreitaj eventoj en Londono, Parizo, Madrido kaj en la urbo Santos en Brazilo. Iom post iom ili ekaperis ankaŭ en malpli grandaj lokoj, kaj se oni nun trafolumas la liston de urboj ekzemple en Usono ĉe Duolingo-eventoj, en nemalmultaj urboj troveblas grupoj por lernantoj de Esperanto, sed ne de aliaj lingvoj.

Komence de junio la prezidanto de UEA, Mark Fettes, kune kun estrarano Emilio Cid kaj la Duolingaj

aktivuloj Chuck Smith kaj Anthony Bodineau havis videan kunsidon kun du administrantoj de Duolingo por diskuti eventualan partnerecon, rakontas Emilio Cid.



– Estis klare, ke la Duolinganoj havas tre pozitivan bildon pri la Esperanto-movado kaj bonvenigas pli proksiman kunlaboron. Estis interkonsentite, ke UEA pretigos esperantlingvan version de la instrukcioj por aranĝi eventojn en la sistemo de Duolingo, kaj helpos ilin selekti kandidatojn por gastigi esperantajn eventojn, li diras.

Por konatiĝi kun la sistemo kaj eventuale helpi kandidatojn, kiuj jam nun volas registri pliajn Esperantajn grupojn ĉe Duolingo, Emilio Cid nun partoprenos kelkajn intervjuojn en la angla.

Baldaŭ tamen la intervjuoj povu okazi en Esperanto, kun partopreno de reprezentanto de UEA, li rakontas. UEA prizorgos ankaŭ tradukon de la aliĝaj formularoj al Esperanto.

Laŭ la plano, UEA poste helpos trovi evento-gastigantojn kiuj jam bone scipovas Esperanton, dum Duolingo helpos inviti progresintajn kursanojn al lokaj Esperanto-eventoj. La traduklaboro komenciĝis, kaj jam nun UEA serĉas volontulojn kiuj pretas aranĝi renkontiĝojn por lernantoj de Duolingo, rakontas Emilio Cid.

Fonto: **Libera Folio**

<https://www.liberafolio.org/2018/06/27/esperanto-furoras-en-renkontigejo-de-duolingo/>

Kio estas pli varma, ĉu ligno aŭ ĉu metalo? Se oni lasas pecojn da metalo kaj ligno en la sama ĉambro kaj atendas kelkajn horojn, la metalo ŝajnas malvarma kompare ol la ligno kiam oni tuŝas ĝin. La temperaturo en la ĉambro restas konstanta, do la du pecoj devus havi la saman temperaturon ĉu ne? Alie fluus varmo inter la ĉambro kaj la pecoj. Malgraŭ tio, kio ŝajnas logika, temperaturo kaj varmo do ne estas la sama afero. Ili rilatas, sed restas du apartaj konceptoj.

La kampo de scienco kiu studas la fluon de varmo kaj aferoj kiuj rilatas al tio nomiĝas termodinamiko. Ĝi venas de la grekaj vortoj por varmo kaj forto. Ĝi estas tre grava temo kaj granda plejmulto el la studentoj de naturaj sciencoj studas ĝin. Ĝi priskribas kiel motoroj funkcias, kio estas tre grava por transporto kaj fabrikado, sed ankaŭ ĥemiistoj uzas termodinamikon por kalkuli ĉu specifaj ĥemiaj reagoj povas okazi. Ĝi eĉ helpas astronomojn, kiuj provas klarigi la naskiĝon kaj morton de la tuta universo. Ĝi povas esti malsimpla kaj kontraŭintuicia scienco, sed kompreni eĉ la bazajn principojn povas multe ŝanĝi kiel oni rigardas la mondon kaj helpi nin eviti penserojn.

Termodinamiko havas kelkajn kernajn leĝojn. Tiuj ne estas kiel la leĝoj en lando, ĉar oni ne ricevas punon kiam oni ignoras ilin. La leĝoj de termodinamiko estas fizikaj leĝoj, laŭ nia kompreno de la universo, ne povas esti rompataj. La unua estas la nula leĝo de termodinamiko, kiu nomiĝas tiel, pro tio ke ĝi estis aldonita poste, kiam la unua leĝo jam ekzistis. La nula leĝo diras la sekvan:

“Se du termodinamikaj sistemoj estas en termodinamika ekvilibro kun tria, ili estas ankaŭ en la ekvilibro unu kun la alia.”

Termodinamikaj sistemoj estas en ekvilibro kiam varmo povas libere flui inter ili kaj la temperaturo inter ili estas la sama. Ekzemplo de tio estas la pecoj de metalo kaj ligno en la ĉambro (en termodinamiko sistemo estas la parto de la universo kiu interesas nin. La peco de metalo povas esti sistemo, la tuta ĉambro, aŭ eĉ la tuta universo!). La pecoj estas en ekvilibro kun la ĉambro, ĉar varmo povas libere flui inter ili kaj se oni atendas sufiĉe longe, la varmo fluos de la pli varma sistemo al la malpli varma, ĝis ambaŭ havas la saman temperaturon. Ni scias do ke la du pecoj estas en ekvilibro kun la ĉambro, sed la nula leĝo diras ke tio signifas ke ili ankaŭ estu en ekvilibro unu kun la alia, eĉ se ili ne tuŝas. Tio do signifas ke malgraŭ tio ke oni pensas ke la ligno pli varmas, la temperaturoj

devas esti samaj. La nula leĝo ŝajnas nenecesa, sed oni povus diri ke ĝi estas la plej grava leĝo, ĉar ĝi igas termodinamikon matematika. La leĝo diras pli abstrakte ke se la sistemoj nomiĝas A, B kaj C, oni povas diri "A=B, do B=A" kaj "A=C kaj B=C, do A=B". Sen la nula leĝo oni ne rajtas aserti tion kaj tio signifus ke oni ne povus priskribi termodinamikon per la matematiko al kiu oni al kutimiĝis. Povas esti ke oni daŭre ne estas konvinkita pri tio ke la du pecoj havas la saman temperaturon, sed oni povas kontroli tion per termometro. La kialo ke la termometro ja sukcesas mezuri la temperaturon sed homo ne estas ke la termometro, se oni atendas iom, estos en ekvilibro kun la sistemo kiun oni mezuras. La termometro mezuras sian propran temperaturon, sed tiu estas la sama kiel tiu de la sistemo kiun oni mezuras. Homoj ne mezuras temperaturon, sed la fluon de varmo. Oni neniam estos en ekvilibro kun la pecoj, ĉar oni mem produktas varmon, sed oni ja povas senti kiel la varmo fluas tra via haŭto. Tio ja dependas de temperaturo, kio igas la sistemon sufiĉe bona por diveni temperaturon, sed ĝi ankaŭ dependas de la materialo kiun oni sentas. Tial la metalo ŝajnas tiom malvarma.

Malgraŭ tio ke ĝi sentas malvarma, neĝo pli rapide fandiĝas sur metalo, pro tio ke ĝi facile tralosas varmon.



Ankaŭ la unua leĝo de termodinamiko estas tre grava. Ĝi priskribas energion kaj kion oni povas fari per ĝi. Pli precize, ĝi diras:

“La interna energio de izolita sistemo estas konstanta.”

Ekzistas malsamaj manieroj por vortigi tion, sed ĉiuj el ili diras la saman aferon. Oni ne povas krei energion el nenio. Ankaŭ tiu aserto povas esti kontraŭintuicia, pro tio ke oni povas bruligi lignon kaj senti la varmon, sed tiu energio jam estis en la sistemo. La varmo kiun oni sentas estas la energio kiu troviĝis en la ĥemiaĵoj de la ligno. Formi la ligojn en la molekuloj kiuj kreiĝas dum la reago kostas malpli da energio ol formi la ligojn en la ligno, do la energio kiun

la reago ne bezonas iĝas varmo. La ligno ricevis tiun energion de la suno kiam ĝi ankoraŭ estis planto kaj la suno liberigas energion per nukleaj reagoj. Kio iĝas evidenta estas ke energio ne formiĝas dum tiuj reagoj, sed ŝanĝiĝas de unu formo al la alia. Ekzistas multaj formoj de energio, ekzemple ĥemia energio en reagoj, kinetika energio de moviĝo kaj radia energio de lumo. Termodinamiko priskribas la fluan de energio per du malsamaj konceptoj: varmo kaj laboro. Termodinamiko estas sufiĉe malnova scienco, do oni ekhavis grandskalan komprenon pli frue ol molekulan komprenon. Grandskale la diferenco inter laboro kaj varmo estas ke laboro povas esti uzata por levi mason. Plej ofte oni konsideras la volumenon laboron de gaso, kiu povas levi mason per pligrandiĝi, sed ekzemple la elektra laboro de baterio ankaŭ enkalkuliĝas, ĉar la elektro povas levi mason per motoro. Oni kalkulas laboron per obligi la forton kiu faras la laboron kaj la distancon tra kiun la laboro puŝas la mason. Varmo anstataŭe estas la fluo de energio inter varma kaj malvarma sistemo. Varmo mem do ne estas energio, sed energifluo. La leĝo iĝas malpli abstrakte kiam oni aplikas ĝin al vera situa io.

Ofta apliko de termodinamiko estas priskribi la kvalitojn de gasoj. Gasoj havas specifajn kvalitojn kiuj ĉiuj interrilatas, nome premo, volumeno, temperaturo kaj la kvanto da molekuloj (sed tiu kutime ne ŝanĝiĝas). Ekzistas diversaj modeloj por priskribi kiel tiuj kvalitoj influas unu la alian kaj la plej simpla estas tiu de ideala gaso. Idealaj gasoj ne vere ekzistas, sed estas modelo por priskribi verajn gasojn. La diferenco estas ke la molekuloj de ideala gaso ne altiras aŭ forpuŝas unu la alian kaj ne perdas energion kiam ili kolizias. Nur gravas la moviĝo de la molekuloj mem. Kiam oni ne laboras kun ekstremaj kondiĉoj, tio estas sufiĉe bona alproksimiĝo. La forteco de la modelo estas ke oni povas kalkuli kvaliton kiun oni ne konas se oni ja konas la aliajn. Se oni do scias kiom da molekuloj da gaso oni havas kaj mezuras la temperaturon kaj la premon, oni povas kalkuli la volumenon de la gaso. Jen demando al kiu oni povas apliki la unuan leĝon de termodinamiko: Se oni havas du ujojn el kiuj unu havas fiksan kovrilon (konstantan volumenon) kaj unu havas kovrilon kiu povas esti puŝata supren (konstanta premo), kiu bezonas pli da energio por atingi la saman temperaturaltiĝon? La problemo ŝajnas stranga, ĉar oni pensus ke oni bezonus same multe da energio por atingi la saman temperaturon, sed tio ne veras. Laŭ la unua leĝo, oni konsideru ĉiujn energifluojn enen kaj eksteren por scii kiom la energio de la sistemo, do ankaŭ la temperaturo, ŝanĝiĝas. Ambaŭ sistemoj ricevas energion per varmo, sed tio ne estas ĉio. Kiam la

gaso plivarmiĝas, la premo plialtiĝas. En la unua ujo tio ŝanĝas nenion, sed en la dua tio igas la gason puŝi la kovrilon. Tio estas laboro! Oni bezonas kompensi por la energio kiun oni perdas tra laboro, do oni bezonas pli da varmo. Por pli facile varmigi ion, ujo kun konstanta volumeno do plej bonas. El la sama koncepto sekvas alia kontraŭintuicia ideo. Sistemo povas gajni kaj perdi varmon sen ŝanĝiĝo de la temperaturo. Kiam oni malrapide kunpremas gason, la temperaturo ne ŝanĝiĝas, sed varmo ja fluas el la sistemo. Tio ne okazas se la sistemo estas bone izolita. Tiukaze la temperaturo plialtiĝas. Kio okazas estas ke oni enmetas energion en la sistemon per laboro (oni puŝas la gason), sed pro tio ke oni faras tion malrapide, la sistemo ĉiam denove atingas ekvilibron kun la medio. Ĉiam kiam oni do aldonas senfine malgrandan kvanton da energio, la sama kvanto forlasas la sistemon tra varmo. Konkrete oni do povas mezuri ke la temperaturo ne ŝanĝiĝas, malgraŭ tio ke ekzistas fluo de varmo, kio denove montras kial oni ne pensu pri varmo kaj temperaturo kiel la sama afero.

Por mezuri la varmon kiu eskapas el sistemo, oni povas fari eksperimenton en izolita "kalorimetro" kaj mezuri la temperaturŝanĝon.



La molekula kompreno de varmo kaj laboro klarigas kial oni distingas du specifajn specojn de energifluo. Ambaŭ rilatas al la moviĝo de molekuloj. Ju pli alta la interna energio de iu materialo, des pli rapide la molekuloj moviĝas. La kvalitoj de gasoj estas regataj de tiu koncepto, pro tio ke la fortoj inter la molekuloj de gasoj estas malgrandaj, do la molekuloj moviĝas pli-malpli libere. La diferenco inter varmo kaj laboro estas la direkto de tiu moviĝo. Laboro rilatas al tre orda moviĝo de molekuloj, kiuj ĉiuj moviĝas en la sama direkto, sed varmo rilatas al la hazarda moviĝo de molekuloj. Konverti laboron al varmo do estas facila, pro tio ke ajna ŝanĝiĝo en la moviĝo de la molekuloj igas ĝin malpli orda. Kiom da laboro estas konvertata al varmo dependas tamen de la vojo kiun oni prenas. Ekzemplo de tio estas ke kiam oni rulas de monto per aŭto, gravito faras la saman kvanton da

laboro, sendepende de ĉu oni bremsas aŭ ne, sed se oni bremsas, la bremsoj iĝas pli varmaj kaj oni ne povas vojaĝi la saman distancon. Oni povas uzi motoron por konverti varmon al laboro, ekzemple per varmigi gason kaj kreskigi ties volumenon, por puŝi la piŝton de la motoro. La diferenco estas ke oni ja povas tute konverti laboron al varmo, sed ne inverse, ĉar krei ordan moviĝon el hazarda moviĝo estas malfacila.

Laste, la dua kaj tria leĝo de termodinamiko priskribas malordon per nova koncepto, nome entropio. Entropio estas mezuro de malordo, sed tio estas tre svaga difino, pro tio ke en la ĉiutaga vivo oni pensas eble pri sia dormĉambro kiam temas pri malordo. En termodinamiko indas pripensi entropion statistike. Ekzistas tiom da aranĝoj kiuj estas malordaj kompare al tiuj kiuj estas ordaj, ke spontanaj procesoj ĉiam strebas al malordo, simple pro probableco. Kiam oni ekzemple liberigas gason en ĉambro, ĝi disiĝos kaj plenigos la tutan ĉambron, ĉar aranĝoj en kiuj ĉiuj molekuloj estas aranĝitaj hazarde estas multe pli oftaj ol tiuj en kiuj la molekuloj estas nur en eta parto de la ĉambro. La entropio do spontane plialtiĝas. Formale la dua leĝo de termodinamiko estas:

“En termodinamike izolata sistemo entropio neniam malkreskas”

Kaj la tria estas plej ofte notata kiel:

“La entropio de perfekta kristalo ja la absoluta nulo (malplej alta temperaturo) estas ekzakte 0”

Oni ne povas malvarmigi sistemon al la absoluta nulo, do oni ne povas rekte mezuri la minimuman entropion de la sistemo, sed por la plejmulto da kalkuloj nur la ŝanĝiĝo de entropio ŝanĝiĝas. Ankaŭ la volumeno de oceano malfacile kalkuleblas, sed se oni aldonas literon, oni almenaŭ povas priskribi la ŝanĝiĝon.

La dua leĝo sonas sufiĉe stranga. Ĝi diras ke la entropio de izolita sistemo restas konstanta aŭ kreskas. Oni vidas tamen ke akvo glaciĝas, la fridujo malvarmigas manĝaĵojn kaj por ne morti, la homa korpo tuttempe batalas kontraŭ entropio. La diferenco estas ke tiuj sistemoj ne estas izolitoj. Prenu ekzemple la fridujon, varmo eliras, la temperaturo malaltiĝas kaj la molekuloj moviĝas malpli. La sistemo do iĝis pli orda. La kuirejo ekster la fridujo ricevis la varmon tamen kaj la molekuloj en ĝia aero ekmoviĝas pli rapide. Kiam oni kalkulas la sumon de tiu negativa kaj

pozitiva ŝanĝiĝo, oni vidas ke la entropio de la kuirejo kaj la fridujo kune pligrandiĝas!

Kvankam la korpo havas pli-malpli konstantan entropion, la entropio de onia manĝo plialtiĝas.



Simple imagu kiom da panoj necesas por kreskigi homon kaj iĝas evidenta ke la entropio de la universo kreskas.

Entropio do ĉiam plialtiĝas, sed kion tio signifas? Homoj povas krei ordon en la propra korpo kaj batali kontraŭ entropio per la energio en la manĝo, sed la energio de tiu manĝaĵo iam venis de la Suno. Ĉiam kiam la energio estis uzata, la entropio de la universo iomete plialtiĝis kaj ankaŭ la Suno ne eltenos por ĉiam. Ĉiu generacio de steloj plialtiĝas la entropion de la universo, do ĝi iĝas pli kaj pli malorda, pli ĥaosa. Por krei stelojn tamen, oni bezonas multe da materialo en unu loko, kio estas termodinamike tre orda. Teorie la entropio do iam iĝos tiom alta, ke steloj ne plu povas formiĝi. Unu el la teorioj pri la fino de la universo estas ke ĝi ĉiam iĝos pli kaj pli orda, ĝis nenio plu povas okazi kaj ĉio estas silenta. Alia teorio proponas ke eble ekzistas aliaj universoj kie la dua leĝo de termodinamiko estas inversigita, aŭ ke post la morto de ĉi tiu universo, ĝi inversiĝos en senfina ciklo. Oni ne povas certi pri la morto de la universo per la nuntempaj rimedoj, sed entropio almenaŭ ebligas interesan observon, nome ke tempo havas direkton. Tio sonas evidenta, sed pruvi tion estas malfacila. Pozicioj kaj moviĝoj estas simetriaj, do oni povas fari la saman proceson ĉie en la universo kaj kun ajna konstanta rapido kun la sama rezulto, sed oni ne povas inversigi tempon kaj malbaki ovon. Kial tempo havas direkton estas granda puzzle tamen kaj unu el la plej interesaj demandoj ĝis nun.

Fonto: **Blogo Scivolemo**

<https://scivolemo.wordpress.com/2018/04/11/kiel-baki-ovon-igas-la-universon-pli-haosa/>

Rilato inter Japanio kaj Mongolio

Inter la 18a kaj 25a de junio 2018 mi vojaĝis al Mongolio kun kvin amikoj. La vojaĝon organizis Enkhee, mongola esperantisto. Mi verkos eseon pri nia vojaĝo.

Kio estas komuna inter Japanio kaj Mongolio?

Ni bezonis pli ol 5 horojn per la rekta flugo al Mongolio. Ĝi estas for de Japanio, sed almenaŭ estas 3 komunaĵoj inter la du landoj.



Unu estas luktoarto nomata, mongole bökh (la supra foto) kaj japane sumoo (la suba foto). Jam multaj certe scias la vorton sumoo pro la internacia Esperanto-legada konkurso sumoo organizita de mi. En la mongola nacia festo nomata Naadam estas tri kampoj: bökh, arkpafado kaj ĉevalrajdado.



En la festo multaj bökh-istoj partoprenas. Ili luktas en la herbejo kaj la luktado daŭras longe, sed multaj entuziasme rigardas la luktadojn en ludejo kaj en televido.

Nun en la japana sumoo-mondo multaj sumoo-istoj devenantaj de Mongolio luktas. Ni eĉ povas diri, ke sen mongolaj sumoo-istoj ne ekzistus la japana sumoo. Nun du el la plaj fortaj sumoo-istoj estas el Mongolio. Unu el tiuj du estas nomata Hakuĥoo, kies patro estis ĉampiono en la mongola bökh. Tiamaniere sumoo aŭ bökh estas komunaĵoj kaj forte ligas la du landojn.



La dua similaĵo estas « mongola makulo ». Preskaŭ ĉiuj japanaj kaj mongolaj beboj naskiĝas kun tiu makulo ĉe sia sidvangoj. Ankaŭ ĉinaj kaj koreaj beboj ofte havas tiun makulon, sed ne

tiel multe kiel en Japanio kaj Mongolio. Kiam ili kreskas, tiu makulo malaperas, do mi ne povas montri mian makulon al vi dum la UK.



Mongoloj kaj japanoj tre similas. Mi ne povas distingi mongolajn sumoo-istojn el la japanaj. Ili tre bone parolas la japanan, sen prononcdiferenco. Mi supozas, ke japanoj devenas de Mongolio.

La tria komunaĵo estas budhismo. Mongola estas Tibeta Budhismo, ne sama al la japana, sed ambaŭ estas budhismo kaj multaj popolanoj en la du landoj estas budhanoj.

Kiel rilatis/as Japanio kaj Mongolio ?

1. Milito en la 13a jarcento

Historie Mongolio kaj Japanio militis du-foje.

La unua milito okazis en la 13a jarcento, kiam mongola armeo atakis Japanion. Tiun tempon Mongolio faris grandan imperion en la tuta Azia Kontinento. Mongolio jam regis Ĉinion kaj Koreion, kaj volis okupi ankaŭ Japanion, sed tiu rifuzis akcepti kapitulacion, do Mongolio sendis armeon al Japanio en 1274 kaj 1281. Japanaj militistoj bone kontraŭbatalis, sed la la plej granda feliĉo por la japanoj en ambaŭ okazoj estis atako de grandaj tajfunoj, kiuj detruis



Maldekstre estas mongolaj soldatoj kaj dekstre estas japana

mongolajn ŝipojn sur la maro. Tiujn ventojn nomis japanoj kamikaze (diaj ventoj).



Mongolaj ŝipoj kun mongolaj kaj koreaj soldatoj

Tiuj kamikaze-oj donis fortan impreson al la japana menso, do preskaŭ 700 jarojn poste, kiam

Japanio okazigis militon en la dua mondmilito, la registaro kredigis al la popolanoj, ke en la japana krizo certe ventegos denove kamikaze-oj kaj savos la patrolandon. Kaj finfine, ĉar ne ventis kamikaze-oj, la

armeo organizis specialan trupon Kamikaze kaj mortigis 3000 junulojn en senfruktaj sinmortigaj kamikaze-atakoj. Tiun kamikaze-atakon heredis nuntempaj islamaj teroristoj. Tiamaniere tiuj mongolaj invadoj ŝanĝis la mondan historion.

La vorto kamikaze estis adoptita en la angla kaj ankaŭ en Esperanto.

2. Milito en la 20a jarcento

La dua milito inter Japanio kaj Mongolio okazis en majo 1939. Tiun tempon Japanio jam sukcesis fondi sian pupan ŝtaton Manŝuu (Manĉurio) en la nord-orienta parto de Ĉinio, kaj ankaŭ etendis sian avidan manon al Sovetio kaj Mongolio. Okazis konflikto inter Japanio kaj Sovet-Mongola koalicio en la regiono Halha proksime de la landlimo de Manŝuu kaj Mongolio. Japanio sendis unu regimenton kaj unu skadron, sed ili estis tute frakasitaj de la modernigita soveta armeo. Partoprenis en tiu milito 59000 japanaj soldatoj, el kiuj mortis 7696, vundiĝis 8647 kaj malaperis (kaptite) 1021. Tiu estis gravega malvenko por Japanio. Tute klariĝis, ke mankas modernaj armiloj, sed la registaro kaŝis tiun malvenkon al la popolanoj kaj nomis la militon kiel Incidento Nomunhan, dum en Mongolio kaj Sovetio ĝi estis nomita Milito de Halha-Rivero.

Se la registaro kaj la armeo ĝuste analizus la kialon de tiu malvenko, ili ne povus komenci militon kontraŭ Usono. Sed Japanio kaŝis ĉion, kaj kredante kaj kredigante, ke « la japana spirito » povos kompensi mankon de modernaj armiloj, komencis la militon, kaj sekve mortigis tri milionojn da japanoj kaj 20 milionojn da azianojn en la tuta Azio.

Dank' al tiu venko mongoloj ekamis Sovetion kaj ekmalamis Japanion. Por akiri amikecan etoson de la



mongoloj, Japanio devis atendi ĝis la 1990-aj jaroj, kiam Sovetio malaperis. Tiam prospera Japanio

komencis helpi Mongolion finance kaj mongolaj sumoo-istoj ekluktis en Japanio.

En Ulaanbaatar estas monumento pri amikeco inter Mongolio kaj Sovetio kun mozaika murpentraĵo. En ĝi estas sceno, en kiu sovetaj kaj mongolaj soldatoj piedpremas japanan armean flagon. Sed certe multaj japanaj turistoj ne komprenas, kial tiu

sceno estas tie. Ankoraŭ nun Milito de Halha-Rivero estas ne konata al multaj japanoj.

3. 12000 japanaj kaptitoj en Mongolio

La tria rilato temas ankaŭ pri milito. Post la fino de la dua mondmilito restis multaj soldatoj kaj civitanoj en Manĉurio. Sovetio kaptis 600 mil japanojn kaj laborigis ilin ne nur en Sovetio, sed ankaŭ en diversaj landoj, inkluzive de Mongolio. Pri tiu temo mi verkos sendepende en alia artikolo.

4. Japanaj forlogitoj al Nord-Koreio

La kvara rilato temas pri japanaj forlogitoj al Nord-Koreio. En 1970-80-aj jaroj Nord-Koreio forlogis kelkdek japanojn al sia lando. Okazis pinta konferenco en 2002 inter la japana ĉefministro Koizumi Ĵuniĉiroo kaj la korea gvidanto Kim Jong-il, kaj tiu aprobis sian kulpon kaj resendis kelkajn al Japanio. Japanio insiste postulis/as, ke Nord-Koreio resendu la aliajn, sed tiu rifuzis tion, pretekstante, ke la afero estas jam solvita.

La nuna ĉefministro Abe Ŝinzoo, sekvante Usonon, insistas, ke la plej granda premado povu forĵetigi al Nord-Koreio ĝiajn nukleajn armilojn, kaj tiamaniere povu solvi la problemon de la forlogitaj japanoj, sed Nord-Koreio tute ne respondas. Nun Trump ŝanĝis sian politikon kontraŭ Nord-Koreio, do certe Abe, forĵetite de Trump, ne scias, kion fari por solvi la problemon. Feliĉe nord-korea gvidanto Kim Jong-un aludis sian intencon renkonti Abe, sed ne troviĝas diplomaciaj rilatoj inter la du landoj. Kion fari? Mongolio povos ludi gravan rolon.

Post la fondo de Nord-Koreio, Mongolio dua aprobis ĝin post Sovetio, kaj sendis helpon al ĝi post la Korea Milito. Mongolio havas amikan rilaton kun Nord-Koreio. Pere de Mongolio Japanio povos kontakti Nord-Koreion. En efektiveco, kiam mi vizitis Mongolion antaŭ ok jaroj, mi vidis s-ron lizuka, reprezentanton de « Asocio de la familioj de forlogitoj », en la sama hotelo. Certe tiun tempon estis iu kontakto inter Japanio kaj Nord-Koreio, kaj pro tio li estis en Mongolio. Mongolio estos grava lando por solvi tiun problemon.

5. Energio

La kvina rilato temas pri energio.

Tuj post kiam okazis la nuklea akcidento en Fukuŝima en 2011, aperis novaĵo en la ĵurnalo Mainiĉi, ke la japana registaro planas konservigi al Mongolio japanajn uzitajn nukleaĵojn. Nun la japana registaro provas funkciigi plej multajn nukleajn reaktorojn, sed ĉiuj nukleaj centraloj estas preskaŭ plenaj de uzitaj nukleaĵoj, kaj se ne estos konservejoj, oni ne povos

plu funkciigi ilin, tamen nenie estas taŭgaj lokoj por tiuj rubaĵoj en Japanio. Mongolio estas tre oportuna por la konservejoj, ĉar ĝi estas 4-oble pli granda ol Japanio kaj la loĝantaro estas nur tri milionoj. La lando estas vaste dezerta kaj povas esti, ke ĉie estas taŭgaj lokoj por la konservejoj.

La registaro tuj publikigis, ke ĝi ne havas tian intencon, sed dum la konserveja problemo plu estas, certe ĝi kaŝe esploras eblecon en Mongolio. Rubaĵoj produktitaj en Japanio iru al alia lando!? Tre hontinda ideo! Se Japanio ne povas solvi tiun problemon en sia lando, ĝi ĉesigu funkciadon de ĉiuj nukleaj centraloj!

Du tagojn antaŭ mia ekiro al Mongolio, mi vidis programon en televido pri sunenergia projekto en Mongolio. Iu japana kompanio iniciatis konstrui sunenergiajn centralojn en Mongolio, kaj tio povos kovri tutan elektron uzaton en la tuta orienta Azio. Tio estas tre bona projekto. Por tio Ĉinio, Koreio, Japanio kaj aliaj landoj devos pace kunvivi kaj kunlabori, kunligante sin per elektra sistemo. Krome, tiam oni ne bezonos nuklean energion. Mongolio povos ludi gravan rolon en la tuta Azio kiel energicentro.

Fine

Dum la pasintaj ok jaroj, mi neniam vizitis

Mongolion. Antaŭe tuj ekster la flughaveno homoj rajdis sur ĉevalo kaj galopis. Sed nun tie staras modernaj apartamentaroj kaj fabrikoj. En la centro de la urbo estas ĉielskrapantaj konstruaĵoj same kiel en Tokio. En la urbo okazas eĉ trafikaj ŝtopiĝoj, sed nenie estas aŭdataj iritataj kornadoj el aŭtomobiloj. Nenie estas rubaĵoj sur stratoj. Ĉiuj tre dece agas. Mi antaŭvidas pli da progreso de la lando. Mi havis tre pozitivan impreson pri la lando.



verkis kaj sendis **Hori Jasuo**, el Japanio

Titoligo de urba placo al la esperantistoj Mario kaj Catina Dazzini

Jaŭde la 31-an de majo 2018 je ĉeesto de pli ol okdek personoj, la Komunumo Massa oficiale titolis placon en la urba centro al esperantistoj Mario kaj Catina Dazzini ("Mario e Catina Dazzini, esperantisti").

Nome de la Urbo salutis la skabeno Silvana Sdoga, kaj ĉeestis Stefano Neri reprezente de la Urbo



sendis Luigia Oberrauch Madella el Italujo

Forte dei Marmi. Ĉeestis ankaŭ Raffaello Franceschini kaj Bruĉjo Kasini, membroj de la Komisiono pri Instruado de la Itala Esperanto-Federacio. Kantis la italan himnon dulingve la infanoj de klaso de la elementa lernejo Vallerga, kie Esperanton instruas prof. Gabriella Lottini. Jen miaj salutvortoj dum la ceremonio:



Bonan tagon al ĉiuj!

Mi estis invitita al ĉi tiu ceremonio honore al la gefratoj Mario kaj Catina Dazzini kaj mi akceptis la inviton volonte.

Ĉi tiuj du grandaj instruistoj ĉiam estis prezentitaj al ni kiel ekzemploj de devontigo al junuloj kaj al ilia plenumo en la profesia vivo.

Kiel rakontas la artikoloj aperintaj en la revuo "l'Esperanto" de la Itala Esperanto-Federacio, la jaroj tuj post la fino de la terura dua mondmilito estis facilaj por neniuj ajn. Oni devis reorganizi la laborpostenojn de multaj civitanoj de Massa kaj en tio profesoro

Dazzini estis helpita de sia granda karismo: li kapablis paroli al junuloj, li sciis kuraĝigi la kunvenojn kaj festenojn per sia muziko ĉe la fortepiano (li estis pianisto), li sukcesis enscenigi prezentadojn kaj teatrajn vesperojn, en kiuj ĉiuj civitanoj partoprenis. Sed ne nur li faris ĉion ĉi: li ankaŭ sciis rakonti ĝin. Por Mario Dazzini estis grave informi ĉiujn pri la laboro farita. Ni ankoraŭ devas lerni tion fari.

Fratino Catina emis esti en la ombro de sia frato kaj li havis tre bonan helpon pere de ŝi. Kiel Mario, kiu renkontis la svisan esperantiston Attinger en novembro 1931 en la Universitato de Florenco, ankaŭ Catina lernis Esperanton kiam ŝi estis tre juna. Ambaŭ estis konvinkitaj pri la eduka valoro de ĉi tiu lingvo kaj laboris favore el ĝia progreso en la socio. Por helpi instruistojn en la vasta mondo, ili fondis ILEI - la Internacian Ligon de Esperanto-Instruistoj, kiu ekzistas kaj aktivadas favore de la kolegoj.

ILEI ĉeestas en la tuta mondo kun 40 naciaj sekcioj, kun reprezentantoj en 13 aliaj landoj kaj kontaktopersonoj en 17 ŝtatoj. ILEI provizas transnacian profesian platformon por instruistoj, kiuj parolas Esperanton. Ĝi ankaŭ celas antaŭenigi la instruadon de la lingvo Esperanto kaj en lernejoj kaj pere de la reto, trejni instruistojn, prepari ekzamenojn, publikigi modernajn lernolibrojn kaj kunvenigi kaj organizi instruistojn de Esperanto kaj iliajn studentojn.

La Ligo publikigas du revuojn: ĝia oficiala organo estas Internacia Pegagogia Revuo por instruistoj kun 4 numeroj jare. La alia revuo nomiĝas "Juna Amiko" kun 4 numeroj jare por la lernantoj de la lingvo.

ILEI havas scienca komitaton, al kiu kunlaboras universitataj profesoroj de Hartford kaj Princicia Kolegio (Usono), Barat (Hindujo), Litovio, Pollando, Italio, Nov-Zelando, Rusujo, Serbio kaj Hungario.

Ĉiun jaron, ILEI organizas konferencon, kiu inkluzivas profesiajn, praktikajn kaj sociajn aspektojn. La listo de la ĵusaj konferencoj atestas la kreskantan

internaciecon de la Ligo: 2006 Parma (Italio), 2007 Ranzan (Japanio), 2008 Porto Novo (Benin), 2009 Krakow (Pollando), 2010 Matanza (Kubo), 2011 Kopenhago (Danio) 2012 Kunming (Ĉinio), 2013 Herzberg (Germanio), 2014 Montevideo (Urugvajo), 2015 Oostende (Belgio), 2016 Nyiregyaza (Hungario), 2017 Busano (Koreio), 2018 Madrido (Hispanio).

La programoj de ILEI ebligas al infanoj el malsamaj landoj malkovri la kulturojn unu de la alia danke al komuna lingvo: plurdekoj de tiaj projektoj estis realigitaj kadre de la eŭropaj programoj Comenius kaj Grundtvig. Ankaŭ la Instrua Komisiono de la Itala Esperanto-Federacio proponas al niaj lernejoj projektojn nomatajn "Unu horo pri Esperanto por infanĝardenoj kaj antaŭlernejaj infanoj" kaj "Unu leciono pri Esperanto por lernejoj". La celo de ĉi tiuj proponoj estas fakte, ke al ĉiuj infanoj devus esti ofertita la ebleco ekscii, ke ekzistas rapide lernebla lingvo, kiu povas esti uzata tuj kaj kiu ebligas al ni komuniki kaj amikiĝi kun homoj tra la tuta mondo.

Mi havis la bonŝancon persone konatiĝi kun profesorino Catina Dazzini. Mi memoras ŝian grandan humanecon kaj ŝian dolĉan rideton, sed ankaŭ ŝian fortan volon neniam preterlasi la celon de la multaj kaj kelkfoje laciĝaj vojaĝoj: komunikado kaj amikeco kun homoj de aliaj landoj kun malsamaj lingvoj kaj kulturoj. Kiel reprezentanto de la itala sekcio de ILEI, mi deziras ĉi tie esprimi mian profundan dankemon al Catina kaj Mario Dazzini, kiuj, per la fonda de ILEI, preparis por ni la vojeton, sur kiu ni povas daŭrigi nian iradon al pli envivebla mondo."

sendis **Luigia Oberrauch Madella**, el Italujo

14 > kredi, ke tiu ĉi okazas al li. Eble li nur sonĝas kaj baldaŭ li vekiĝos el la belega sonĝo. Li denove demandis ĵetante timeman rigardon al sia amikino.

— Ĉu vere vi fariĝos mia amikino?

— Jes. KREDU min! En ĉio mi helpas al vi kaj ankaŭ vi al mi. Kio estas via ŝatata lernobjekto?

— La matematiko. Mi ŝatas kalkuli.

— Bonege, ĉar ankaŭ mi — ĝojegis la knabino. Ni havas komunan interesiĝon.

Nun jam ankaŭ la knabo ridetis kaj li forgesiĝis pri sia lameco. Ankoraŭ neniam li sentis tion ĉi. Nun jam ankaŭ li havas amikinson.

Ili kune kaj feliĉe ekiris al la korto.

— **Onklo Adalberto** —

Fonto: **Vesperto** #309 februaro 2018



Saluton,


En ĉi tiu numero de nia revueto ni daŭrigas la Mallongan Historion de Filozofio kun la jena filozofo.

Vasil Kadifeli

Sigmund Freud (1856-1939)

Kaŝitaj Pensoj

Ĉu vi vere konas vin mem? La antaŭaj filozofoj pensis, "Jes". Sed povas esti partoj de via menso, kiujn vi neniam povos atingi rekte, ili estas ŝajne ĉambroj, kiuj estas ĉiam ŝlositaj, tiel ke vi neniam povos eniri ilin.



Tio, kion ni vidas povas esti trompo. Ekzemple al ni ŝajnas, ke la suno rondiras la teron sed tute ne, kaj tion la homaro malkovris en la 16-a jarcento danke al la astronomo Nikolao Koperniko. Alia ŝokita afero estis tio, kion Charles Darwin malkovris en la 19-a jarcento: Homoj kaj simioj devena e iu komuna prapatro!

La tria granda revolucio en homa penso estis la malkovro de Sigmund Freud: la subkonscio. Li rimarkis, ke multe da tio, kion ni faras, estas pelita pro deziroj, kiuj estas kaŝitaj en nia menso. Kvankam ni ne scias pri ili, ili efektas nin multe. Ĉi tiuj subkonsciaj deziroj havas profundan influon sur nia vivo kaj kiel ni organizas la socion. Ili estas la fonto de la plej bonaj kaj plej malbonaj aspektoj de homa civilizo. Parto de tiuj eltrovoj ni povas trovi en la verkoj de Friedrich Nietzsche

Freud, komencis sian karieron kiel neŭrologo. Li vivis en Vieno, kiam Aŭstrio ankoraŭ estis parto de la Aŭstrio-Hungara Imperio. Li estis filo de juda patro de meza klaso kaj ano de bone edukitaj junaj homoj en tiu epoko. Dum li kuracis kelkajn junajn malsanulojn, lin altiris la psika parto de homo, pri kiu li kredis, ke regas niajn kondutojn. Lin interesis histerio kaj aliaj specoj de neŭrozo. Tiuj malsanuloj estis plejparte virinoj, kiuj piediris dun en dormo, halucinis kaj eĉ paralizigis. Freud ne sciis kiu estis la kaŭzo de tiuj problemoj, sed tra zorgema atento sur tio, kion la malsanuloj rakontis pri iliaj pasintecoj li konstatis, ke la vera fonto de ĉi tiuj problemoj estis ia deziro aŭ sperto en ilia subkonscio.

Freud petis ke la malsanuloj kuŝu sur sofo kaj paroli pri io ajn ili havas en siaj pensoj kaj ankaŭ rakonti pri siaj sonĝoj. La pacientoj sentis sin pli bone

ĉar ili estis lasantaj siajn pensojn libere elflui kaj tiel Freud malkovris kaj alportis kelkajn el tiuj pensoj el iliaj subkonscioj al iliaj konscioj. Parolado iasence tiel, kiel kuracilo malŝloasis la subkonsciojn en kiu estis pensoj pri kiuj ili ne volis pensi kaj sentis premon kaj tiel ili liberiĝis sin kaj la simptomoj estis kuracitaj. Tiu estis la naskiĝo de psikanalizo.

Laŭ Freud ne nur malsanuloj sed ni ĉiuj havas tiajn pensojn en nia subkonscio kaj tiel la vivo en la socio fariĝas ebla. Ni kaŝas de ni mem tion, kion ni deziras kaj ni sentas. Kelkaj de tiuj pensoj are perfortaj kaj multaj estas seksaj. Li kreis la ideon de Edipa komplekso (la knaboj volas mortigi sian patron kaj havi sekson kun sia patrino) kvankam homoj tiun deziron tute ne rimarkas. Tiaj pensoj estas senkonsciaj deziroj pri kiuj la homo ne povas ekkonscii. Kelkfoje tiaj pensoj eskapas el la subkonscio kaj povas aperi en sonĝoj kiel simboloj. Sonĝoj estas la vera vojo al la subkonscio por malkovri tiajn pensojn. Sonĝoj en kiuj oni vidas serpenton, pluvombreton aŭ glavon montras premsenton pri sekso ĉar tiuj simboloj rilatas al penis. Sako aŭ kaverno en sonĝoj estas simboloj pri vagino. Eble vi pensas ke tiuj estas absurdaĵoj sed Freud dirus ke vi pensas tiel ĉar via menso provas protekti vin el tiaj pensoj pri sekso. Alia afero estas la freŭda lang-glito. Kelkfoje dum ni parolas, ni senvole elbuŝigas strangajn vortojn kiuj tute ne rilatas al nia parolado. Ekzemple seksaj vortoj, kaj tiam, tio montras ke ni havas subkonsciajn dezirojn pri sekso sed ilin ni ne scias.

Sed ne ĉiuj subkonscia deziroj estas pri sekso aŭ pri perforto, kelkaj montras fundamentajn konfliktojn. Ekzemple vi devas pasi gravan ekzamenon kaj vi ĉion faras por trapasi ĝin. Kaj viaj tutaj klopodoj ŝajnas tre sukcesaj. Tamen en la tago de la ekzameno vi prenas eraran buson kaj vi tiel maltrafas la ekzamenon. Ie en la profundo de via subkonscio estas deziro pri ne sukcesi en tiu ekzameno.

Freud metis grandan kvanton de demandoj sur temoj pri kiuj la antaŭaj filozofoj asertis pri la homa menso.

Kvankam multaj filozofoj agnoskas la eblecon de subkonscio, ne ĉiuj agnoskas la bazon de la ideoj de Freud. Kelkaj asertis, ke la teorioj de Freud ne estas sciencaj. Pli poste Karl Popper diris ke la ideoj de Freud pri psikanalizo estas "nefalseblaj". Tio ne estis komplimento sed kritiko ĉar por li, la esenco de la scienca esplorado estas testado, sed oni ne povas testi la ideojn de Freud.

(daŭrigota)

En ĉi tiu jaro 2018 oni rememoras la naskiĝon de granda artisto. En 1918 naskiĝis la usonano Leonard Bernstein, kiu estis unu el la plej eminentaj muzikistoj en la XX-a jarcento. Omaĝe al li, oni programis ĉi-jare en Brazilo prezenton de lia "meso", kio neniam antaŭe okazis en ĉi tiu lando.



Laŭ diversaj aspektoj, li estis muzikisto kun tre forta personeco. Rilate al lia privata vivo, oni ofte multon komentas, sed ĉi tiu aspekto ŝajnas al mi malpli signifa ol lia libera spirito kiel artisto. Li estis pianisto,

dirigento, komponisto, produktanto de eventoj kaj por tiel diri pedagogo. Fakte, li dediĉis grandan parton de sia energio al la junularo. Li proponis koncertojn al junula publiko kaj verkis edukajn tekstojn tiucele.

Ekzemplo de lia larĝa koncepto pri muzika arto estas tio, ke li ofte transpasis teoriajn limojn inter "klasika" kaj "popola" muziko. Kvankam li plenumis severan lernadon en universitata nivelo, lia muziko estis "flora". Liaj temoj por arta verkado estis ampleksaj: bibliaj temoj, meso, ĵazaj ritmoj, juda liturgio, modernaj "operetoj", kinomuziko. Li lasis komponaĵojn, kiuj fariĝis modernaj klasikaĵoj. Ni menciigu du el ili:

La unua estas eble lia plej konata verko: "Rakonto el la Okcidenta Regiono" (West Side Story), opereto (1957), kiu fariĝis filmo lanĉita en 1961. Ĝi enhavas

siajn larmojn de ridado.

La simpatia maljuna sinjoro perplekse rigardis de unu al alia. „Mi ne komprenas vian gajecon. Ĉu vi bonvolas klarigi al mi, pri kio vi tiom amuziĝas? Se longa milito kostis unu bilionon da dolaroj, kial do longa paco ne povas esti samvalora? Kio do, bonvolu diri al mi, estas tiom ridiga?“

Nun ili ridadis ankoraŭ pli laŭte. Estas vere infera ridado. Unu el ili ne povis resti sidanta. Li eksaltis, firme tenis siajn dolorajn flankojn kaj kriis per siaj lastaj fortoj: „Vi estas vera stultulego. Milito – milito estas ja io tute alia!“

La ŝtatestroj, la simpatia maljuna sinjoro kaj ilia gaja konversacio estas plene inventitaj. Ke la milito kostis unu bilionon da dolaraj kaj kiom aliflanke oni povus fari per unu biliono, oni povas trovi en usona statistiko.

amhistorion lokitan en Novjorko, kie batalas inter si du rivalaj stratbandoj – inspirita je la dramo de Ŝekspiro, "Romeo kaj Julieta". Kelkaj kanzonoj en tiu verko fariĝis tre popularaj.

La dua estas simfonio "La Aĝo de Anksio", el 1947. Sentoplena verko, kies movimentoj estis inspiritaj je la samnoma longa poemo de la angla aŭtoro Wynstan Auden. En tiu verko, la piano sonas forte, kiel parto de la orkestro mem, en tute neordinara maniero. Ankaŭ ĝi enhavas ĵazajn elementojn.

Kiel dirigento, Bernstein staris antaŭ la plej gravaj orkestroj. Li portis sian brilan muzikon al la mondo dum siaj multaj ekskursoj. Li estis ne nur talenta, sed karisma. Pro tio, li ricevis amason da premioj kaj estas rekonata unuanime kiel eminenta artisto el la pasinta jarcento



verkis **Paulo Sergio Viana**, el Brazilio

Fonto: <http://esperantaretradio.blogspot.com/2018/04/jubileo-de-largmensa-artisto.html>

Vi povas aŭskulti tiun ĉi artikolon en la supra ligilo.

32
>>>

Verkis **Erich Kästner** *

el **Laŭte** numero 162 novembro 2002

(dumonata liberesprimilo por progresemuloj)

* *Erich Kästner naskiĝis en 1899 kaj mortis en 1974.*

Li verkis multajn poemojn, librojn, precipe tre famiĝintaj infanlibrojn, ekzemple Emil kaj la detektivoj. Pro lia politika opinio liaj libroj estis forbruligitaj en 1933, ĉar la nazioj opiniis ilin „demoraligaj“. Li estas aŭtoro de tre multaj tekstoj kontraŭ milito.

** *Laŭ mia opinio tiu teksto, verkita antaŭ pli ol 60 jaroj! (marto 1948) estas kaj restas aktuala ĝis hodiaŭ – bedaŭrinde!*

(Noto de la tradukintino: **Nora Caragea, DE**)



Ni parolis kun Ivan ĉirkaŭ horo kaj duono en la klubejo. Lia trankvila voĉo allogis min.

- Mi aŭdis virinajn paŝojn – rakontis Ivan – kaj mi petis : “ Helpu min trapasi la straton!” Post minuta silento la virino kolere ekkriis: “Idioto!” – kaj preterpasis.

Lia voĉo estis trankvila, eble li jam estis travivanta la ĉagrenon de la ofendoj, eĉ li provis ŝin pravigi:

- Antaŭ mia tragika travivaĵo, ankaŭ mi ne rimarkis la

nevidantulojn...

Post 20-taga sendorma laboro, neatendite la mondo ĉirkaŭ li malaperis. Li ne perdis esperon – li iris serĉi sanigon de la specialistoj en Moskvo, Odeso, Parizo. De nenie espero. Tiam li estis en la mezo de sia vivvojo, estis vivkapabla, kun aŭtoritato, talentoj kaj revoj.

Foje li diris al mi:

- Iu tage mi rakontos al vi pri la du larmoj de la blindulo.

Nun li komencis rakonti:

- Kiam mi trapasas iun straton, mi povas kompreni laŭ la bruo ĉu estas danĝero aŭ ne. Iun tagon, ĝuste en la mezo de la strato, mi ekaŭdis proksime de mi bremson, malfermon de fenestro de aŭto, insulton kaj la kolerajn vortojn: ”Ho, ĉu vi estas blinda?!...” Mi ne memoras kiel mi atingis la trotuaron, plorante. La aŭto verŝajne estis de la novaj modeloj – rapida kaj senbrua, pro tio mi ne aŭdis ĝin... En lia rakonto mankis riproĉo.

- Alia foje mi jen ekiris, jen revenis, mi ne riskis trapasi la straton, ĉar al mi ŝajnis aŭdi ion. Kaj je la strato mi aŭdis, ke ĝis mi haltis granda aŭto. Mi rigidiĝis.

- Mi vin rigardis de malproksime – diris al mi vira voĉo. – Venu, tie ĉi estas la trotuaro...

Li min kondukis. Kaj mi ekploris pro la kompato de la nekonata homo. Tiuj estas la du larmoj de la blindulo, pri kiuj mi vin diris.

“Mi havas proksimumon, kiel vi” – lin diris tiu viro. – “Kiam la sorto nin batas, tiam ni ekvidas...”



verkis **Elena Popova**, el Bulgario

Gratulojn al "Esperanto en Azio" !

-- mesaĝo de Hori Jasuo

Estimataj,

La venonta numero de “Esperanto en Azio” estos la 100-a. Mi atendas vian salutmesaĝon al tiu numero.

Historieto de "Esperanto en Azio"

1990 majo

Unua numero de "Esperanto en Azio" eldoniĝis. Eldonanto: prof. d-ro SO Gilsu (estranano de UEA pri la azia agado) Redaktanto: Joachim WERDEN (Pollando)

1991 oktobra numero

Ŝanĝo de redaktanto de "Esperanto en Azio" Eldonanto: prof. d-ro SO Gilsu (Koreio) Redaktanto: DOI Ĝieko (Japanio)

1995 oktobra numero

Ŝanĝo de eldonanto de "Esperanto en Azio" Eldonanto: TAKEUTI Josikazu, prezidanto de KAEM (Japanio)

2001 septembro

Ŝanĝo de redaktanto de "Esperanto en Azio": HORI Jasuo (Japanio)

2005 majo

50 numerigo kaj 15-a datreveno de "Esperanto en Azio"

Nun ni eldonas 4 numerojn jare; nome januaro, aprilo, julio, oktobro.

Redaktoro **HORI Jasuo** * (Japanio) 371-0825 Japanio, Gunma, Maebasi, Ootone 2-13-3 emailto: hori-zonto@water.sannet.ne.jp

Revizistoj: **Tahira Masako** (Japanio), Tahira seninterrompe laboras kun Hori.

Albert Stalin Garrido (Filipino) antaŭ ne longe partoprenis.

Presado kaj ekspedo: **Japana Esperanto-Instituto**

* Hori laboras de la 39-a numero (septembro 2001). Ĝis la fino de 2007 li eldonis 3 numerojn jare, sed poste 4 numerojn. Hori seninterrompe eldonadas 3 aŭ 4 numerojn ĉiun jaron jam dum 17 jaroj.



La virino aperis ĉiam dum la granda interleciona paŭzo. Arjanov vidis ŝin de la fenestro sur la dua etaĝo. Nun, en la komenco de la printempo, ŝi ankoraŭ surhavis brunan vintran mantelon, larĝan, ne laŭ ŝiaj mezuroj. Ŝiaj longaj malhelaj haroj falis sur la ŝultrojn kiel flugiloj de hirundo. Videblis, ke ŝi estas bela. Ŝiaj grandaj helaj okuloj similis al maturaj orecaj vinberoj kaj ŝia vizaĝo estis iom pala kiel ĉina porcelano. Ŝia irmaniero memorigis la molajn movojn de kapreolo. Arjanov ne povis difini kiomjara estas la virino, eble tridek aŭ tridek kvin. Ŝi staris kun levita kapo ĉe la lerneja barilo, aŭ vagis tien reen ĉe la granda pordo. Ofte, oftege ŝi rigardis al lernejoj fenestroj kaj atendis la eksonoron de la sonorilo por la interleciona paŭzo.

Vintre kaj printempe, post la eksonoro de la sonorilo la gelearnantoj inundis la korton kiel malbarita rivero, kaj en la vasta areo kvazaŭ ekrampis sennombraj skaraboj. La virino, kiu staris ĉe la barilo, rekonsciiĝis, eniris la korton kaj ekiris, rigardante dekstren kaj maldekstren. Ŝi ĉirkaŭiris la korton, ŝovis sin inter la gelearnantoj kaj finfine ŝi trovis tiun, kiun ŝi serĉis. Li estis Vasko de la sepa "bo" klaso, malalta, fragila knabo kun krispa hararo kaj brilaj okuloj kiel koloraj riveraj ŝtonetoj. La virino eliris lin flanken kaj longe ŝi parolis ion al li. Kun klinita kapo, senmova, Vasko aŭskultis ŝin. Kiam la sonorilo denove eksonoris por memorigi la lernantojn, ke la interleciona paŭzo finiĝis, Vasko kun aliaj knaboj ekiris al la lerneja konstruaĵo. Liaj samklasanoj komencis primoki lin, nomis lin "la fileto de panjo" kaj "bebo", sed Vasko silentis, rigardis teren, ŝvita kaj ruĝa kiel elektra forno. Larmoj plenigis liajn helajn okulojn, tamen li premis la dentojn kaj ne montris sian koleron. Ofte la infanoj estas ege kruelaj, – meditis Arjanov.

La patrino de Vasko trapasis malrapide la grandan lernejan korton, kiu jam estis senhoma kaj similis al raketa dromo, ŝi eliris tra la vasta pordo kaj ekiris sur la strato, preter la lernejo. Arjanov rigardis ŝin dum ŝia malhela figuro malaperis post la stratangulo. Li ne komprenis kial la patrino de Vasko ĉiutage venas en la lernejon kaj kion ŝi parolas al la filo dum la dudekminuta interleciona paŭzo. En la kapo de la instruisto ŝvebis diversaj supozoj, sed eĉ unu ne ŝajnis al li logika.

Vasko estis silentema, sinĝena knabo. Li evitis siajn samklasanojn kaj tre malofte partoprenis en iliaj petoloj, konversacioj kaj incitetoj. Li bone lernis, ne estis perfekta lernanto, sed ankaŭ ne meza. Vasko penis en la lernado, tamen ofte dum la lernohoroj, liaj pensoj ŝvebis ie. Li strabis la nigran tabulon, sed

evidente li flugis ien malproksimen.

Arjanov havis la strangan senton, ke li kaj Vasko similas unu al la alia. Kiam Arjanov estis knabo, lia patrino, same kiel la patrino de Vasko, ege zorgis pri li. La patro de Arjanov forpasis, kiam Arjanov estis en la unua klaso de la baza lernejo, kaj li havis nek fraton, nek fratinojn. Arjanov ne povis forgesi, ke lia patrino vekiĝis frumatene por kuiri por li teon kaj ŝmiri pantranĉaĵon per butero, kaj poste ŝi akompanis lin al la lernejo. Tiam Arjanov hontis kaj li ne deziris, ke ŝi akompanu lin.

Ĉiumatene en neĝo kaj en varmeĝo la patrino iris kun li ĝis la lerneja pordo. Nun Arjanov opiniis, ke por ŝi tio estis rito, ege grava rito. Ŝi certe ĝojis, ke li lernas, ke li estas diligenta lernanto kaj ŝi nepre deziris helpi al li, instigi lin, aŭ eble ŝi provis gardi lin kontraŭ io, ŝi maltrankviliĝis pri li. Ja li estis ŝia sola infano, kaj ŝi timis perdi lin, sed tiam Arjanov ne komprenis tion, kaj li hontis pri ŝi. Tiam li opiniis sin aĝa, deziris esti memstara kaj suferis, ĉar la aliaj knaboj primokis lin.

Kiam li estis lernanto en gimnazio, kaj se hazarde li malfruis vespere, lia patrino tuj iris serĉi lin ĉe liaj amikoj kaj samklasanoj. Kiel stranga kaj nekomprenebla estas iam la patrino amo, meditis li.

Foje, post la interleciona paŭzo, Arjanov vokis Vaskon.

– Kial via patrino venas ĉiutage en la lernejon? – li demandis.

Vasko alrigardis la instruiston kaj iĝis ruĝa, kvazaŭ seka dezerta vento subite trafis lin, sed nenion li respondis kaj kelkajn sekundojn li senmove gapis al la tero.

– Bone, diru al via patrino, ke ŝi venu, mi deziras paroli kun ŝi, – diris Arjanov.

La sekvan tagon la patrino de Vasko venis en la lernejon. Arjanov invitis ŝin en la instruistan ĉambron, li proponis al ŝi seĝon, sed ŝi restis staranta. Ŝi strabis lin streĉe kaj maltrankvile, eble ŝi supozis, ke Arjanov plendos pro Vasko. Ŝiaj okuloj, kiuj similis al maturaj orecaj vinberoj, brilis.

– Sinjorino, – komencis Arjanov, – via filo estas bona lernanto, diligenta, kaj mi estas kontenta pri li, sed kial ĉiutage vi venas en la lernejon? Vasko jam lernas en la sepa klaso, kaj li estas sufiĉe aĝa...

Ŝi ne tuj respondis. Eble ŝi hezitis kion diri, sed subite ŝi ekparolis:



– Mi estas lia patrino. Kiam li diras, ke li iras en la lernejon, mi devas kontroli ĉu li vere estas en la lernejo.

Arjanov alrigardis ŝin mire kaj nenion plu demandis.

Ŝi diris “ĝis revido” kaj ekiris. Arjanov akompanis ŝin ĝis la lerneja pordo. Kiam li revenis, Vasko staris antaŭ la klasĉambro kaj atendis lin.

– Vasko, kial vi estas ĉi tie? – demandis Arjanov.

– Sinjoro instruisto, – ekflustris la knabo, – ne koleru al panjo. Mi ne koleras al ŝi, ke ĉiutage ŝi venas en la lernejon, malgraŭ ke la knaboj min primokas...

Arjanov alrigardis lin.

– Ŝi estas patrino. Mi komprenas ŝin, Vasko, – malrapide diris la instruisto.

Fonto: La Balta Ondo

<http://sezonoj.ru/2018/03/modest-5>

Esperanto en Jalto plu vivas

-- el la Balta Ondo

Nun mi povas diri la suprajn titol-vortojn, ĉar sukcesis la printempa Esperanto-aranĝo Aroma Tero (“ArTe”), organizita en la Krimea urbo Jalta. Sed antaŭ duonjaro, kiam mi por ĉiam adiaŭis mian forgeseman sed neforgeseblan edzon, Jefim Zajdman, mi eĉ ne imagis, ke tio eblos. Mi tute ne planis gvidi la Jaltan Esperanto-klubon Tero anstataŭ Jefim, kiu dum kvardek jaroj estis la ĉeforganizanto, motoro, cerbo kaj koro de nia klubo, kaj mi eĉ pensis translokiĝi al Odeso, kie loĝas miaj filoj. Sed mi hazarde komprenis, ke neniu krom mi povos daŭrigi liajn aferojn... Ĉiuj jaltaj esperantistoj kaj amikoj de Jefim rigardis min kaj ion atendis de mi. Kaj mi restis en Jalto. Restis por kolekti novajn kaj malnovajn esperantistojn, por organizi ion interesan, por daŭrigi la aferojn de Jefim.

Jefim Zajdman tragedie pereis la 23an de decembro kaj mi dum tuta monato konstante respondis retmesaĝojn kaj leterojn de liaj amikoj, parolis kun la homoj skajpe kaj telefone. Kaj pensis, kion fari por konservi Esperanton en Jalto. Iam mi interparolis kun Tatjana Orjol el Volgogrado, kantistino kiu bone scias kaj uzas Esperanton dum eksterlandaj vojaĝoj, kaj dum la interparolo aperis la ideo fari printempe renkontiĝon omaĝe al Jefim.

La sperta kaj saĝa Jefim preskaŭ ĉion faris mem, sed mi bezonis helpantojn kaj skribis al Svetlana Smetanina kaj Irina Gonĉarova. Ili subtenis la ideon kaj promesis helpi organizi la Aroman Teron. Rezulte al ni venis ses esperantistoj el aliaj regionoj kaj multe da krimeaj esperantistoj kaj tiuj, kiuj interesiĝas pri Esperanto.

La programo de Aroma Tero, kiu okazis en Jalto de la 29a de aprilo ĝis la 5a de majo, estis interesa, la vetero bona, la loĝado estis komforta kaj nemultekosta. Niaj profesiaj kantistinoj (T. Orjol el Volgogrado kaj V. Jareŝko el Peterburgo) koncertis ĉiuvespere, P. Moĵaev (Simferopolo) kaj S. Smetanina (Moskvo) gvidis ĉiumatene Esperanto-kurseton por diversaĝaj kaj diversnivelaj dezirantoj. Ekskursoj estis tradiciaj: gastoj vizitis palacojn, parkojn, plaĝojn,

promenis tra la urbo kaj laŭ la marbordo. Ili veturis al tuttaga ekskurso al Sebastopolo.

La plej grava parto de ArTe estis renkontiĝo en la urba biblioteko A. P. Ĉeĥov. La programo estis dediĉita al Jefim Zajdman kaj tie estis aranĝita ekspozicio de esperantaĵoj el la arkivo de Jefim. Dekomence estis koncerto, sonis kantoj, kiujn li tradukis, en la plenumo de T.Orjol kaj V. Jareŝko.

Krom esperantistoj al la biblioteko venis poetoj, verkistoj kaj tradukistoj, ĉar en ĉi aranĝo estis prezentita la 57a numero de la almanako En rondo de amikoj, dediĉita al Jefim Zajdman. 42 paĝoj el 400 rakontas pri Jefim.

La biblioteko proponis fari konstantan ekspozicion pri Esperanto en la hela kaj komforta salono – ni devos nur aĉeti ŝrankojn kaj montrofenestron. Eble iam en Jalto aperos Esperanto-muzeo, kiu estus la plej bona memoro pri la vivo kaj multflanka agado de Jefim Zajdman. Post ArTe mi gvidas Esperanto-kurseton por infanoj kaj iliaj patrinoj, planas eldoni libron pri Jefim kaj libron de Jefim pri Esperanto-pioniroj, kiun li verkis sed ne sukcesis eldoni...

Vidu mem, ĉu nun mi povas forlasi Jalton kaj forveturi?

verkis **Anĵela Belenko**

Fonto: La Balta Ondo

<http://sezonoj.ru/2018/06/ruslando-14>



La 7-an de aprilo okazis eksterordinara afero, monda premiero de Esperantlingva opero "Sternenhoch" en la Nacia Teatro de Prago.

Temas pri opero, kies muziko estis komponita rekte laŭ teksto en Esperanto, farita de Miroslav Malovec. Muzikon kaj libreton komponis juna komponisto Ivan Acher. Opero havis surprize grandan sukceson, ne nur de spektantoj sed ankaŭ de kantistoj, kiuj diris, ke Esperanton ili taksas kiel ideala lingvo por opero. Okazis 5 spektakloj kaj ĉiuj estis tute disvenditaj tuj post ĝia premiero - dum la tempo de unu semajno! Eĉ je du monatoj antaŭ la lasta spektaklo oni ne povis aĉeti biletojn.

Pavel Pavliček havis la eblon videoregistri la tutan spektaklon por arkivo. Bedaŭrinde li ne rajtas publike prezenti ĝin, nur eble kelkajn fragmentojn - post la permeso de la Teatro.

Fragmento, la lasta minuto de la opero, la 24-an de junio 2018 en Nacia Teatro en Prago.

<https://www.youtube.com/watch?v=ZfSmjGuNH1I>



Pavel Pavliček skribas:

Karaj amikoj, mi jam skribis pri opero Sternenhoch en Esperanto, kaj mi devas aldoni novajn faktojn pri ĝi. La opero Sternenhoch denove estos prezentita sur scenejo de Nacia Teatro - Nová scéna - en decembro la 14-an, 27-an kaj 28-an 2018. - vidu programtabelon:

<https://www.narodni-divadlo.cz/cs/program?f=2018-12-01>

Mi faris videoregistraĵon pri la tuta opero, sed mi rajtas uzi partojn de la registraĵo nur post oficiala permeso de la Nacia Teatro. Do mi jam alŝutis la unuan videon en Jutubo kun permeso de estraro de Nacia Teatro. Temas pri la fino de la spertaklo.

<https://www.youtube.com/watch?v=ZfSmjGuNH1I>

Intervjuo kun la reĝisoro Michal Dočekal:

<https://www.youtube.com/watch?v=Hziv3vOx9a0>

"Al mi persone la opero ege plaĉis, belega muziko, perfekta kantado, ĉarma koreografio ankaŭ danca, belegaj kostumoj, spektaklo fakte ne havis malinteresajn partojn. Vi eĉ ne devis kompreni Esperanton. Ĉio estis facile komprenebla pro bela muziko kaj aktoraj kapabloj de artistoj. Por tiuj, kiuj malgraŭ tio deziras pli detale kompreni tekston, estis simultane projekciitaj subtekstoj en la supra parto de scenejo en la ĉeĥa kaj la angla lingvoj.

Laŭ kritikistoj temas pri unu el la plej sukcesaj operoj dum la lastaj 20 jaroj, prezentitaj en Nacia Teatro. Bedaŭrinde en la sekva sezono ĝi ne aperos en la programo, ĉar programo estis farita antaŭ la premiero de opero kaj neniu antaŭvidis tiel grandan sukceson. Se vi ŝatus en la estonto spekti la operon en la Nacia Teatro, vi skribu vian peton al la estraro de la Teatro. Ne skribu, ke pro la Esperanto, skribu nur ke vi aŭdis pri la granda sukceso kaj vi ŝatus spekti ĝin.

Okaze, ke vi havas eblecon de gastigado de la opero en via urba teatro, skribu al mi. Mi sendos al vi kontakton al persono, kiu povas interkonsenti kun vi.

Laŭ mia scio, en estonto estos havebla ankaŭ studia sonregistraĵo en kompakta disko por ke vi povu aĉeti ĝin.

Mi ankaŭ persone parolis kun la aŭtoro de la opero en Esperanto, kun komponisto Ivan Acher, kiu havas ege pozitivan opinion pri Esperanto. Li estas bonkora homo, malfermita al ĉio. Mi faris intervjuon kun li antaŭ kamerao kaj ĝi estos enhavo de estonta video pri la opero Sternenhoch. Li ne kapablas paroli Esperanton, sed post multmonata laboro kun teksto en Esperanto li multon komprenas. Li diris, ke ekzemple por li estus granda honoro, prezenti profesie faritan operon dum Universala kongreso (eble en Lahti) . Li estas preta interkonsenti kun organizanto pri favoraj financaj aferoj. Kaj por partoprenantoj kaj eble ankaŭ por lokanoj de la urbo povas esti opero farita de Nacia Teatro interesa kaj bonega magneto!"

Amike

Pavel Pavliček

Verda Stacio

<https://www.youtube.com/user/11pably/videos>

tel: +420-608003593

Komence de 1920 la katolikan subpastron de Sibiu vizitis du senditoj de la loka laborista organizo. Ili havis la jenan peton: „En nia organizo estas diversaj popolanoj, kiuj parolas germane, hungare aŭ rumane, sed ni ne scias la lingvon unu de la alia. Ni aŭdis, ke vi uzas mondlingvon, kiun komprenas ĉiu.”

Kompreneble, temis pri la deziro lerni Esperanton. Lernolibroj ne estis haveblaj. La petita subpastro, tamen, elturniĝis. Li komencis instrui la diverslingvanojn per simpla konversacio. Naskiĝis tio, kion la esperantistoj konas kiel la „Ĉe-metodon”.

Ĝia aŭtoro estis András Cseh [ĉe]. Li tiam estis ŝtatano de Rumanio, sed la rumanan lingvon li neniam lernis. Simile kiel Zamenhof, li devenas el multnacia regiono kaj ne estas facile lin klasifi laŭ nacieco. Sed Transilvanio, kie Cseh kreskis, tradicie estis pli tolerema ol la regiono de Bjalistoko, kaj li estis eĉ malpli ol Zamenhof strikte ligebla al unu nacio. La avo estis ĉeĥdevena kaj nomis sin Ĉech; pro profesiaj kaŭzoj li translokiĝis de Bohemio al alia angulo en la aŭstra-hungara monarkio, al Transilvanio. Tie kunvivis hungaroj, germanoj kaj rumanoj. La patrino estis hungardevena; hejme oni parolis germane. Kiam Andreo naskiĝis (en 1895), la familia nomo estis jam hungarigita al Cseh.


La junaĝo de Andreo Cseh pasis en tempo de tempestaj ŝanĝoj post la militeksplozo de 1914. Fizike tro malforta por soldatservi, li komencis studi juron en Budapeŝto. Sed du jarojn poste li revenis al sia hejmgregiono por ekstudi katolikan teologion. La prezento de Ed Borsboom kredigas, ke Andreon logis unuavice la perspektivo, ke kun la profesio de sacerdoto estas ligita ne tro da streĉo. Ĝi certe utilis por havi tempon por Esperanto, kiun li eklernis jam en 1911. La debutan natur-metodan instruadon en Sibiu sekvis la gvidado de kursoj en Cluj kaj la ĉefurbo Bukareŝto. Li ankaŭ vojaĝis eksterlanden, kaj jam en 1924 pensis pri laboro por Esperanto ekster Rumanio. La episkopa superulo, lia granda favoranto, permesis al li liberiĝi de la sacerdotaj devoj; komenciĝis alispeca „apostolado”, nome vojaĝoj tra eŭropaj landoj, dum kiuj Cseh faris varbajn prelegojn, kutime kun „prov-lecionoj” de sia metodo. Precipe sukcesaj estis lia partopreno en la Universala Kongreso en Dancigo (1927) kaj la posta prelegvojaĝo tra Svedio. Li sukcesis altiri mirige multajn novajn lernantojn de Esperanto pro unika miksaĵo de talentoj: Laŭ Borsboom, Cseh havis magian ĥarismon, li kvazaŭ lude instruis, sorĉis per anekdotoj kaj kapablis sen streĉo entuziasmigi homojn per/por Esperanto. Li, ne

malplej grave, estis bonaspekta viro, kiun precipe junulinoj admiris, eĉ adoris.

Per la biografio de Borsboom ni ekscias multon pri la etoso de la Esperanto-movado antaŭ (kaj post) la dua mondmilito. Okazis konfliktoj; la oficiala movado emis suspekti lin pro lia troa memstareco. Sed se temas pri populareco inter ordinaraĵ esperantistoj, la aŭtoro prave metas Cseh kaj Julion Baghy sur la saman ŝtupon. Interesaj estas ankaŭ la karakterizoj de la ĉefaj kunagantoj de Cseh, la ege simpatia geedza paro Julia kaj Jan Isbrücker, la pradisĉiplo Tiberio Morariu, la klera judo Sigismundo Pragano (al kies konvinkopovo ankaŭ la recenzinto dankas sian esperantistiĝon), aŭ tiel malsamaj personoj kiel Lidja Zamenhof, George Alan Connor, Margarete Saxl kaj Jorge de Saldanha Carreira. Kiam Andreo Cseh en 1965 iĝis 70-jara, inter la gastoj de la festa akcepto estis Willem Drees, la eksa ĉefministro de Nederlando, unu el la miloj, kiuj lernis Esperanton en „Ĉe-kurso”.

Andreo Cseh, kiu mortis en 1979, „tiel insiste, trudĉarme elokventis, ke li kreis kvazaŭ hipnotan etoson”, skribas Ed Borsboom. La sama homo montris severan disciplinon: En siaj kursoj li neniam mankis kaj neniam venis tro malfrue. Al lia personeco apartenas ankaŭ, ke li ne estis unu el la iom senkoloraj „neŭtraluloj”, kiuj regis la movadon inter la du mondmilitoj. Cseh, la „ferianta” pastro, estis iom maldekstrema. Dekomence li tre kritike rilatis al la nazia reĝimo en Germanio kaj malkaŝe publikigis sian opinion pri ĝia politiko kontraŭ Esperanto. En 1942, meze de la milito, li en la okupita Nederlando kuraĝis organizi sekretan kunvenon por fondi la mondfederalisman Universalan Ligon.

Ed Borsboom estas dankinda pro tiu ĉi biografio pri homo, kiu, kiel formulis la revuo Esperanto en nekrologo, „fariĝis legendo jam dum sia vivo”.



Ulrich LINS

Ed Borsboom: Vivo de Andreo Cseh. Eld. Internacia Esperanto-Instituto, Hago, 2003. 313 paĝoj. ISBN 90-805651-2-1.

Fonto: <http://www.monato.net/2006/008971.php>

am estis simpatia maljuna sinjoro, kiu havis la malbonan kutimon, ke de tempo al tempo li inventis raciajn aferojn. Nome: malbona kutimo tio iĝis nur tial, ke tion elpensitan li ne retenis por si mem, sed li kutimis tion prezenti al fakuloj. Ĉar li estis riĉa kaj malgraŭ siaj raciaj ideoj li estis ankaŭ respektata, fakuloj devis aŭskulti lin tre pacience, spite al siaj grincantaj dentoj. Kaj certe por fakuloj ne ekzistas pli terura turmento ol ridetante aŭskulti iun saĝan proponon. Ĉar la racio, tion ja ĉiu scias, simpligas malfacilajn problemojn tiamaniere, ke al tiuj fakuloj ili aspektas suspektindaj kaj tiel nekredablaj. Kion do, tiel oni demandas sin kune kun ili, tiuj kompatinduloj povus fari, se regus ne ili, sed anstataŭe la racio! Do, jen.

lutage la simpatia maljuna sinjoro estis avizita dum iu kunsido, en kiu partopenis la plej gravaj ŝtatestroj de la mondo por, tiel oni eksciis, forigi la surterajn disputojn kaj malfacilaĵojn. Granda Dio! ili pensis., kiu povas antaŭvidi, kion hodiaŭ denove li planas por ni kaj per sia stulta racio! Kaj ili petis lin eniri. Li venis, riverencis iomete eksmode kaj eksidis. Li ridetis, ili ridetis. Fine li ekparolis.

„Karaj sinjoroj kaj ĉefŝtatestroj,“ li diris, „mi havis, tiel mi kredas, utiligeblan ideon: Oni kontrolis ĝin laŭ ĝia praktika uzebleco; mi deziras prezenti ĝin al via rondo. Bonvolu aŭskulti min. Vi ne ŝuldas tion al mi, sed al la racio.“ Ili kapjesis, kontraŭvole ridetante, per siaj ŝtatestraj kapoj, kaj li daŭrigis: „Vi intencas certigi al viaj popoloj trankvilon kaj pacon. Tio unuavide kaj laŭ raciaj konkludoj povas signifi, kion ajn malsamaj povus esti viaj ekonomiaj opinioj, ke vi celas la kontenton de ĉiuj homoj sur la tero. aŭ ĉu mi eraras tiurilate?“

„Tute ne!“ ili reagis. „Absolute ne! Kion vi pensas pri ni, simpatia maljuna sinjoro!“ - „Kiel bele!“ li respondis. „Tiuokaze via problemo estas solvita. Mi gratulas al vi kaj al viaj popoloj. Veturu hejmen kaj komune asignu el la financoj de viaj ŝtatoj, en kadro de la koncerna konstitucio kaj dividita laŭ bonhavo, iun sumon. Tiun sumon mi jam petis kalkuli plej

precize, kaj je la fino mi diros ĝin al vi! Per tiu sumo okazos jeno: Ĉiu familio en ĉiu el viaj landoj ricevos donace malgrandan belan vilaon kun ses ĉambroj, ĝardeno kaj garaĝo, ankaŭ aŭtomobilon. Ĉar post tio la imagita sumo ankoraŭ ne estos elspenzita, vi povas – ankaŭ tio estas kalkulita – en ĉiu loko de la mondo kun pli ol 5000 loĝantoj, konstruigi novan lernejon kaj modernan malsanulejon. Mi envias vin. Mi ja ne kredas, ke materiaj aferoj reprezentas la plej valorajn surterajn havaĵojn. Tamen mi estas sufiĉe racia por kompreni, ke la paco inter la popoloj unuavice dependas de la materia kontenteco de la homoj. Dirinte, ke mi envias vin, mi mensogis. Mi estas feliĉa.“



La simpatia maljuna sinjoro prenis el sia poŝeto etan cigaron kaj ekbruligis ĝin.

La ceteraj ĉeestantoj pene ridetis. Finfine la plej supera el la ŝtatestroj ekkuraĝis paroli demandante per raŭka voĉo: „Kiom alta estas la sumo antaŭvidita por viaj celoj?“ – „Ĉu por miaj celoj?“ la simpatia maljuna sinjoro demandis, kaj oni konstatis el lia voĉo ioman miron. „Do, vi parolu nun!“ aldonis indigne la dua plej supera ŝtatestro. „Kiom da mono estus necesa por tiu eta ŝerco?“

„Unu biliono da dolaroj“, la simpatia maljuna sinjoro respondis trankvile. „Unu miliardo havas mil milionojn, kaj unu biliono havas mil miliardojn. Temas pri la cifero unu kun dek du nuloj“, kaj li daŭrigis fumi sian etan cigaron.

„Vi estas absolute idiota!“ iu kriis. Estis ankaŭ unu el ŝtatestroj.

La simpatia maljuna sinjoro eksidis rekte kaj rigardis mirigite al la kriinto. „Kiel vi venas al tiu ideo?“ li demandis. „Kompreneble temas pri multe da mono. Sed la lasta milito kostis la tute saman, kiel diras la statistiko.“

Aŭdinte tion, la ŝtatestroj kaj ĉefŝtatestroj okazigis tondran ridegon. Estis vera kriegado. Ili frapis la proprajn kaj najbarajn femurojn, ili kriaciis kaj forviŝis



SILABA KRUCVORTENIGMO

PO	DI	A		O-G	LO	PO	TO
SU	PEN		TO	NER	I		RAN
MAT		PA	DI	E		NO	PE
TO	DA	O	KRE		ĜO	TI	ES